

# ESPERANTO




Universala Esperanto-Asocio (en konsultaj rilatoj kun UN kaj Unesko)

**Somerkurso per Esperanto**

**E-projektoj ĉe Unesko**

**Por sociologio de  
la movado**



**Langlet:  
la esperantista  
Schindler**



# Enhavo

- 81 Estraro de UEA: Wells transdonos bonfartan UEA (István Ertl)
- 82 Esperantisto kontraŭ malhomeco (trad. Kalle Kniivilä)
- 85 Instruado: La dua potenco de ESP (Mauro La Torre);  
Somerkursoj per Esperanto (Antonio Alonso Núñez);  
Omaĝi al Cseh = avangardi (Jozefo Németh);  
Jam pli ol 400 ekzamenitoj (Marija Belošević);  
Konversaciaj rondoj en UK (Andrzej Petty);  
Jubilea Cseh-vidbendo (Katalin Smidéliusz);  
Plena Manlibro de E-Gramatiko
- 88 Eksteraj rilatoj: Pri E-projektoj ĉe Unesko; Nova TEJO-EJO  
Informado: Pretiĝu jam por Ago-Tago! (Mark Fettes)
- 89 Kongresa komuniko 3 de la 80-a Universala Kongreso en Tampere
- 90 Sociologio: Pledo por sociologio de la Esperanto-movado  
(Nikola Rašić)
- 91 Esperantologio: Por volumo kvindeka kaj plu  
(Wera kaj Detlev Blanke)
- 93 Laste aperis; Libroj el Sarajevo ree haveblaj
- 94 Esperanto en radio: Babelismo aŭ interplektiteco (Bruno Masala);  
Radioelsendoj en Esperanto
- 96 Forumo: La vojo al la lernejoj (János Petik);  
La ozontruo estas kulturtruo (Wolfgang Gunther)
- 97 Reagoj
- 98 Loke – Fake
- 100 Anoncetoj; Oficiala Informilo

## Vi trovos

ateston pri kuraĝa vivosavado, dum la dua mondmilito, fare de esperantisto kiun niaj historiistoj registras inter la plej fruaj pioniroj de la internacia lingvo (p. 82-84). “Kial oni neniam faris filmon pri Zamenhof?” demandis iam Umberto Eco. Post *La listo de Schindler*, ni povus simile demandi: “Kial oni neniam faris filmon pri Valdemar Langlet?”

Tia filmo certe kontribuas al la “memkonscio, mi-sento” pri kiu parolas (p. 90-92) Nikola Rašić, sociologiumante pri la mondo de Esperanto-parolantoj — mondo kiun ni ŝatus vidi pli vasta kaj multnombra, kaj kiun kreas precipe niaj instruistoj, jen sur la spuroj de Andreo Cseh, jen per propedeŭtika eksperimento, jen lanĉante some-rajn kursojn universitatajn, kiuj meritas subtenon de ĉiuj kiuj povas helpi al kunrealigo (p. 85-87). La laboro de la E-pedagogoj povas interesi ankaŭ Uneskon, se iliaj planoj estas konkretaj kaj serioze preparitaj (p. 88).

*La kovrilo: “Milita Budapeŝto”. Foto el Maskerado ĉirkaŭ la morto de Teodoro S. Švarc.*

## ESPERANTO

Oficiala organo de  
Universala Esperanto-Asocio

(en konsultaj rilatoj kun UN kaj Unesko)

**Aperas** monate (escepte de aŭgusto).

**Fondita** en 1905 de M. P. Berthelot (1882-1910). **Establita** kiel organo de UEA en 1908 de Hector Hodler (1887-1920). **Legata** en 115 landoj. **Voĉlegata** por blinduloj.

**Redaktoro:** István Ertl.

**Abonprezo:** varias laŭlande (gld. 61; US\$ 33; GM 55; enoj 4320; ktp); petu informojn ĉe via landa asocio aŭ de la ĉi-suba adreso. Unuopa ekzemplero kostas 5,50 guldenojn.

**Anoncarifoj** (gld.): 1 p. 1940, 1/2 p. 1075, 1/4 p. 580, 1/8 p. 320, 1/16 p. 175. Movada rabato 50%. Eksterakovrilaj anoncoj kostas duoble. Rabato por tuja ripeto 20%.

**Manuskriptoj:** Se eble, akompanataj de komputila disketo 3,5-cola.

**Adreso:** Centra Oficejo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

**Telefona:** (010) 436 10 44; 436 15 39.

**Telefakso:** (010) 436 17 51.

**Elektronika poŝto:** uea@inter.nl.net.

**Telegramoj:** ESPERANTO ROTTERDAM.

**Banko:** Bank MeesPierson, Postbus 749, 3000 AS Rotterdam (konto n-ro 25.52.89.804). Nederlanda poŝta ĝirkonto: 37 89 64 (Den Haag).

**Kreditkartoj:** 

**Ĝenerala Direktoro:** Simo Milojević.

**Direktoro de la CO:** Osmo Buller.

### Estraro de UEA

**Prezidanto** (kunordigado, reprezentado): prof. d-ro John C. Wells, 5 Poplar Road, London, Britio SW19 3JR; tel. +44/(0)181/542-03-02; fakso 715-40-10.

**Vicprezidanto** (landa kaj regiona agado): d-ro Ulrich Lins, Gemarkenstr. 150, DE-51069 Köln, Germanio; tel. +49/(0)221/680-32-50.

**Ĝenerala Sekretario** (informado, eksteraj rilatoj, CED): s-ro Mark T. Fettes, 158 A Henderson Avenue, Ottawa, Ontario, Kanado K1N 7P6; tel. +1/613/565-92-82; fakso 565-92-79.

**Estrarano** (financo): s-ro Hans Bakker, Kastelenstr. 231-II, NL-1082 EG Amsterdam, Nederlando; tel. +31/(0)20/642-18-53.

**Estrarano** (azia agado): prof. d-ro So Gilsu, Yangchon PO Kesto 11, Seoul — 158-600, Korea Respubliko; tel. kaj fakso +82/(0)2/646-54-13.

**Estrarano** (kulturo, kongresoj): s-ino Michela Lipari, Viale Giulio Cesare 223, IT-00192 Roma, Italio; tel. +39/(0)6/39-72-61-98; fakso 39-72-61-69.

**Observanto** (Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj [ILEI]): s-ino Marija Belošević, Sveti duh 130, Crnomorec, HR-41000 Zagreb, Kroatio; tel. +385/(0)1/576-092; fakso 433-407.

**Observanto** (Tutmonda Esperantista Junulara Organizo [TEJO]): s-ro Danny ten Haaf, Clarensteeg 2 G, NL-2312 WJ Leiden, Nederlando; tel. kaj fakso +31/(0)71/148-801.

# Wells transdonos bonfartan UEA

**Lastfoje kunsidis en sia nuna konsisto la Estraro de UEA inter la 24-a kaj la 26-a de marto, dum pli ol dudek horoj. Kompletigis ĝin la observantoj de ILEI kaj TEJO, kaj CO-oficistoj.**

**A**lmenaŭ tri estraranoj ne kandi-datiĝos en Tampere por nova 3-jara mandato: So Gilsu, Ulrich Lins, kaj John Wells, kiu nun kompletigas sian duan sinsekvantan periodon kiel prezidanto kaj sekve, laŭ la Statuto, ne estas reelektebla.

La Estraro notis kun kontento la unuiĝon de la du tutlandaj asocioj en Rusio kaj la proksimiĝon de la du argentinaj asocioj. En Kroatio daŭras organiza dueco, sed Kroatia E-Ligo kaj Kroata E-ista Unuiĝo ja kunlaboras plurkampe. Kiel granda atingo taksigis la starigo de komuna asocio en Nederlando (nov., p. 198). Male, zorgigis la malfondo de Slovakkia E-Asocio, kiu en 1994 donis 7% de la aligita membraro de UEA. Estis nomumitaj novaj ĉefdelegitoj por Ĉeĥio (Stanislava Chrdlová), Danio (Kaj Røssum), Kanado (Olga du Temple) kaj Nov-Zelando (David Dewar).

Oni konstatis la forvelkon de Internacia Unuiĝo de la E-istoj-Filologoj. (Strange se pensi pri la filologismo de multaj e-istoj.) Ĝermis vigla diskuto pri la neceso de klara politiko rilate fakajn asociojn: ĝenerala sekretario Mark Fettes favorus sintenon pli malferman al organizoj neesperantistaj kies celoj proksimas al la niaj. Formale ili ja ne povus mem aliĝi al la sistemo de fakaj asocioj ligitaj al UEA, sed tio eblus por iliaj jamaj aŭ fondotaj E-sekcioj.

La financa stato de UEA kontentigas: ĝia plej taŭga montriĵo, la bilanco, fartas bone i.a. pro la pliiĝo de donacoj kaj heredaĵoj, kaj pro la rezulto de la Seula UK: ĉ. 110 mil gld, kiuj dividiĝas inter Korea E-Asocio kaj la Propaganda Kaso de UEA.

La malgrandigo de la negativa saldo de la spezokonto progresas konforme al la Komitatitaj instrukcioj: por 1994 ĝi proksimas la buĝetitajn 38 000 gld. (t.e. 8000 gld. malpli ol en 1993). Tio rezultis el kostreduktaj kaj ŝparaj aranĝoj de la CO. La atingito des pli notindas ĉar 41 000 gld. da rento-enspezoj ne plu eniras la spezokonton, sed aldoniĝas al la kapitalo de dumvivaj membroj. Se la spezokonto estus

farita kiel en antaŭaj jaroj, ĝi montrus profiton de 3000 gld.!

La interna kontosistemo de UEA estas ĉiam pli uzata de esperantistoj. Tio metas ŝarĝon de multthora kromlaboro sur la kasiston. Leviĝis pro tio la ideo fiksi minimuman kurtaĝon por ĉiu transpago (ekz. 0,10 gld.).

Por 1996 la Estraro ne proponas altigon de la baza membrokotizo. Pro la relativa forteco de la guldeno, la kotizoj tamen devos altiĝi en multaj landoj. Malgraŭ tio, atendeblas kresko de la individua membraro. (Komence de aprilo 1995 estis ĉ. 500 IM pli ol en la sama monato de 1994.)

Hans Erasmus, komisiito pri rilatoj kun Konsilio de Eŭropo, antaŭ ne longe traktis kun funkciuloj de KdE pri ebloj de kunlaboro. (Post la estrarkunsido, dum aprila kongreso de Radikala Partio en Romo, li interparolis ankaŭ kun Emma Bonino, komisionano de Eŭropa Unio, kiu pretas lanĉi esploron pri la lingva problemoj rilate la rajtojn de konsumantoj.)

ILEI povis raporti vigliĝon en pluraj aziaj landoj. La ĝisnuna redaktoro de *Internacia Pedagogia Revuo*, Márta Kovács, demisiis, sed Jozefo Németh (Kilián ltp. 75/9, HU-8500 Pápa, Hungario) tuj transprenis la laboron.



**La Esperanta sekcio de la japana religia movado Oomoto de longe kutimas prezenti sin en UK-oj. UEA volonte kunlaborus kun pluaj E-filioj de neesperantistaj organizaĵoj.**

Pro manko de laborforto, la Informa Fako daŭre lame agas. Ĝi almenaŭ planas vigligi la serion *Esperanto-dokumentoj*, ĝis atingo de kvar numeroj jare. La anglalingvaj erojn ekde nun redaktos Fettes kaj eldonos la usona asocio, ELNA.

Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la monda lingvo-problemo (CED) denove okazigos sian tradician Novjorkan konferencon en majo, kun la Traduka Fako de UN. Same en majo, Kanada Centro pri Lingvaj Rajtoj (Otavo) kaj CED aranĝos komunan seminarion.

Ĉela Novjorka oficejo de UEA neprus trovi pli da laborpretaj homoj; ĝuste nun la 50-jariĝanta UN ŝajnas tre malfermita al reform-ideoj, eĉ radikalaj.

La supera nivelo de la ILEI/UEA-ekzamenoj (vd. p. 86) daŭre ne estas lanĉebla, ĉar mankas sekretario kaj prezidantoj. Fettes esprimis la opinion ke la prestiĝo de la ekzamenoj plialtiĝus se la delegitoj de UEA estus instigitaj atingi almenaŭ la nivelon de meza ekzameno.

La nova grafika vesto de *Esperanto* rikoltis laŭdojn same ĉe la estraranoj kiel ĉe la publiko. La aperitmo estas nun de longe akurata. Kritiko trafis la enhavon: la revuo donu pli inspiran bildon pri la movado kaj per pli da utilaj lokaj spertoj tutmonden. La Estraro decidis ke ĝia jarraporto, post dujara aparta apero, denove eniru la revuon, june.

*István Ertl*



# Esperantisto kontraŭ

**E**n 1982 aperis en Svedio la libro *Kaos i Budapest* ("Kaoso en Budapeŝto") de Nina Langlet, vidvino de Valdemar Langlet, cetere filino de la rusa E-pioniro Nikolaj Borovko (al kiu Zamenhof skribis la faman "Leteron al Borovko"). Ĝi rakontas kiel, dum la kaosaj monatoj de post marto 1944, la geedzoj Langlet kaj iliaj kunlaborantoj ĉe Sveda Ruĝa Kruco savis en Budapeŝto multajn milojn da judoj. Jen redakcie adaptitaj fragmentoj el la libro, kiu aperos en la serio *Kargo de eldonejo Jean-Claude Bernard*, en esperantigo de Kalle Kniivilä.

Tuj kiam la germanoj okupis Hungarion la 19-an de marto 1944, la anoj de Gestapo senprokraste komencis sian teruran laboron. Ili jam havis pretajn listojn de homoj kiujn oni arestu.

Unu tagon en aprilo 1944, kiam la teruraj deportadoj el la hungara kamparo al la germanaj trudlaborejoj kaj mortigejoj jam daŭre okazadis, naskiĝis la ideo ke Sveda Ruĝa Kruco komencu help-agadon en Hungario.

Mian edzon, Valdemar Langlet, tre skuis la rakonto de juna viro kiu sukcesis fuĝi el la koncentrejo Auschwitz. La junulo priskribis la hororan likvidadon de la judoj, kaj Langlet senprokraste ekagis.


En majo 1944 Sveda Ruĝa Kruco povis ekrealigi la ideon de Valdemar Langlet — disdoni protektajn dokumentojn al persekutataj homoj. Ĉi tiuj dokumentoj ricevis la nomon "protekt-letero".

La 9-an de julio Raoul Wallenberg alvenis al Budapeŝto. Ankaŭ li komencis disdoni protektajn dokumentojn, kiuj ricevis la nomon "protekt-pasporto".

**Valdemar Langlet (1872-1960) aktivis kiel unu el la plej fruaj svedaj esperantistoj inter 1891 kaj 1909.**

**Hodiaŭ tamen, 50 jarojn post la fino de la dua mondmilito en Eŭropo, ni rememoru lin kiel savinton de miloj da persekutitoj en 1944-1945.**

**Laŭ la amplekso kaj kuraĝo de sia homsava agado, li meritis saman famon kiel la film-heroiĝinta germano Schindler.**



## Valdemar Langlet (1872-1960)

Valdemar Langlet esperantiĝis en 1890 kaj kunfondis en 1891 en Uppsala

la unuan Esperanto-klubon en Svedio (la duan en la tuta mondo), kiun li prezidis de 1892 ĝis 1899. Dum kelkaj jaroj tiu klubo estis tutmonda movada centro, ĉar, post la ĉeso de *La Esperantisto* en 1895, Langlet lanĉis kun Paul Nylén la novan gazeton *Lingvo Internacia*, kiu inter 1896 kaj 1899 presiĝis en Uppsala. Langlet prezidis la Svedan E-istan Societon de 1906 ĝis 1909. Lia unua edziĝo (1899), al Signe Blomberg el Finnlando, estas la unua konata geedziĝo inter esperantistoj.

En la 1890-aj kaj 1900-aj jaroj li faris vojaĝojn en Rusio, Azio, Suda kaj Orienta Eŭropo kaj Afriko, kiujn li priskribis en svedaj gazet-artikoloj kaj libroj. Lia Esperanta vojaĝo tra Finnlando, Ruslando, Rumanio, Aŭstro-Hungario kaj Germanio, en somero 1895, restas dokumentita en *Lingvo Internacia*.

Post filologiaj studoj ĝis 1894, li laboris la tutan vivon kiel ĵurnalisto (unue en Uppsala, kaj de 1898 ĝis 1927 en Stokholmo) kaj verkisto. Li estis sekretario aŭ estrarano de Sveda Turisma Asocio (1907-1911), de Popolkleriga Ligo (1907-1910) kaj de Sveda Asocio por Nordia Kunlaboro (1924-1928).

De 1932 ĝis 1945 li vivis en Budapeŝto (vd. la artikolon), kie en 1955 strato kaj lernejo ricevis lian nomon. En majo 1945 li devis forlasi Hungarion, ĉar Sveda Ruĝa Kruco ĉesigis tie sian agadon. Reveninte al Svedio, li organizis helpkomitaton por Hungario, kaj en 1946 eldonis pri siaj travivaĵoj la libron *Verk och dagar i Budapest* ("Laboro kaj tagoj en Budapeŝto").

Krome li aperigis i.a. la librojn *Revolutionsrörelsen i Ryssland* ("Revolucia movado en Rusio", 1905), *Kriget om Balkan* ("La milito pri Balkano", 1912) kaj *Det stora världskriget* ("La granda mondmilito", 1914-21).



# malhomeco



**Kutima strat-  
bildo de Buda-  
peŝto en vintro  
1944-45, kiam  
daŭris la sav-  
agado de  
Valdemar  
Langlet**

**Langlet post  
la milito en  
Svedio, kun  
sia ruĝkruca  
kunlaborantino  
Mici Kóla**

## **Amikon montras malfeliĉo**

La 14-an de novembro 1944 okazis drama incidento. Alvenante al sia oficejo mia edzo trafis strangan spektaklon: inter la multaj timigitaj helpopetantaj judoj kiuj amase atendis en lia oficejo, ĉirkaŭradis armitaj sagkruculoj [hungaraj faŝistoj]! Ili komencis elpeli la judojn el la ejo.

Tiam enmiksiĝis mia edzo, kaj estis stranga vidaĵo kiam la grizhara, senarmila delegito kaptis la kolumon de la sagkruca estro kaj skuis lin.

— Kion vi faras ĉi tie?! Eliru ĉiuj!! Mi tuj telefonos al via ĉefo kaj raportos pri via aŭdaco!

Li kaptis la parolilon, sukcesis kontakti la ĝustan instancon, rakontis pri la okazaĵo kaj ricevis promeson ke oni donos ordonon al la sagkrucula estro. Poste li premis la parolilon al la orelo de la sagkruculo, dirante:

— Jen vi ricevos ordonon, kaj ĝin vi obeu!

La sagkruculo aŭskultis kaj, konfuzita, ricevis sian ordonon. La bando komencis eliri, sed kaptis la okazon kaj prenis kun si kelkajn el la atendantaj judoj, sakrante kaj malbenante la judojn, la “aĉulojn Langlet” kaj la tutan Svedan Ruĝan Krucon.

Mia edzo kuregis post ili surstraten, kaj preskaŭ iĝis tumulto, kiam li klopodis permane liberigi kelkajn el la kaptitoj. La sagkruculoj komencis pafi, unue en la aeron, kaj unu el ili volis eĉ ĵeti mangrenadon tra la oficeja fenestro al la ĉambro de mia edzo.

En tiu momento estis preteriranta nia amiko József Heinrich, li kaptis la brakon de la bandito kaj kriis:

— Ĉu vi freneziĝis? La oficejo estas sveda teritorio protektata de la legacio. Ĉu vi volas provoki Svedion al milito?

La viro mallevis la grenadon, kaj mia edzo siavice komprenis la vanecon de sia batalo. Intertempe oni el lia oficejo telefonis al nia legacio kaj diris ke “la ruĝkruca delegito minacas vivdanĝero”. La sendito Danielsson tuj alvenis al la loko kune kun ataŝeo, sed ili trovis mian edzon jam ĉe sia labortablo, kie li sidis skribante novajn protektleterojn.

## **La ruĝkruca delegito Valdemar Langlet**

Kiu fakte estis tiu viro, kiu en la aĝo de 72 jaroj pro sankta furiozo sin ĵetis en la batalon kontraŭ la ruiniga naziismo en Hungario?

Valdemar Langlet estis inter la unuaj esperantistoj en Svedio kaj eldonis gazeton kiu nomiĝis *Lingvo Internacia*. Esperanto ligis lin al miaj estontaj gepatroj, kiuj siavice apartenis al la unuaj rusaj esperantistoj. En la tiama Rusio estis malpermesite presi ion en Esperanto, sed ne estis malpermesite legi la lingvon. Tial Valdemar Langlet sendadis la gazeton *Lingvo Internacia* al miaj gepatroj, kiuj fondis E-centron en Sankt-Peterburgo, kaj mia patrino distribuis la gazeton al ĉiuj esperantistoj en Rusio.

Unu fojon Valdemar kaj lia amiko Eric Etzel decidis veturi al Rusio kaj uzi nur Esperanton; ili volis vidi kiel oni elturniĝos en la praktiko. Valdemar kontaktis doktoron Ostrovskij, esperantiston en la urbo Odeso, kaj tiu organizis la tutan vojaĝon por tiuj du svedaj studentoj. Doktoro Ostrovskij petis mian patrinon gvidi la du svedojn



en suda Rusio. Tion mia patrino faris — ŝi vagis kun ili tiom ke ŝiaj plandumoj eluziĝis.

Valdemar volis ankaŭ provi la vivon de rusa kamparano; li veturis al vilaĝo, anoncis sin ĉe la vilaĝestro kaj petis loĝi kaj labori en kamparana familio. Tiun vojaĝon li poste priskribis en sia libro *Till häst genom Ryssland* (“Rajde tra Rusio”, 1898).

Dum sia rajdo li renkontis la grandan verkiston Lev Tolstoj en ties Jasnaja Poljana, kaj Tolstoj petis lin skribi en skandinaviaj gazetoj ke li ne volas akcepti la pacpremion de Nobel, kiun oni en Norvegio planis doni al li.

En la jaro 1899 Valdemar Langlet edziĝis unuafoje, al Signe Blomberg el Turku en Finnlando.


Valdemar Langlet perdis sian karan edzinon en 1921, kaj komencis plenigi sian vivon per eĉ pli da taskoj. Li jam verkis kaj tradukis multajn librojn el diversaj lingvoj.

[En 1923 li veturis al Sovetio, kiel “la unua ĵurnalisto de la sveda dekstrema gazetaro”. Li rekontaktis la familion Borovko — Nikolaj Borovko intertempe mortis — kaj, vidante ties mizeron, li proponis kunpreni unu el la infanoj al Svedio por unu jaro. Nina Borovko baldaŭ post tio ricevis elveturpermeson.] Sed mi ne revenis la sekvan jaron, kaj en 1925 ni geedziĝis.

En la jaroj 1930-31 ni loĝis en Dubrovnik (Jugoslavio).

El Jugoslavio ni veturas al Budapeŝto, kaj tie ni restas 14 jarojn. Nin atendas varia vivo.

Valdemar rajdas tra tuta Hungario kaj ekkonas la loĝantaron de kamparanoj ĝis aristokratoj. Siajn impresojn li redonas en la libro *Till häst genom Ungern* (“Rajde tra Hungario”, 1934).



**Supre:**  
**Langlet ĉe sia**  
**Budapeŝta**  
**labortablo.**  
**Ekde 1925 ĝis**  
**la vivofino**  
**lin sindone**  
**helpis lia dua**  
**edzino, Nina**  
**Langlet**  
**(dekstre).**



Li iĝas lektoro pri la sveda en kolegio, poste en universitato, kaj montriĝas tre kompetenta instruisto. Samtempe li ankaŭ komencas labori en la sveda ĉefkonsulejo kiel oficisto. Ekde tiu tempo li ĉiam pli evoluigas sian help-agadon: li helpas senrimedajn studentojn, donas ekonomian subtenon al du familioj.

Sed en 1944 la sorto de Hungario estas sigelita, la progreso de la nacioj komenciĝas. Valdemar vidis ke spite ĉiujn klopodojn de Sveda Ruĝa Kruco kaj aliaj help-organizaĵoj, la neniigo pluiras timige grandskale. Tiam li decidis konvinki la tri episkopojn protesti kontraŭ la persekutado de judoj. Valdemar proponis ke ĉiuj tri, ceremonie vestitaj, vizitu la tiaman [faŝistan] regnestron Szálasi kaj postulu ke oni finu la furiozadon de la sagkruculoj. La episkopoj de la luterana kaj reformita eklezioj konsentis, sed la katolika primaso, kardinalo Jusztinián Serédi, ne kuraĝis partopreni. La tuto malsukcesis.

Por iom prilumi kiel la hungaroj aprezis la kontribuojn de Valdemar dum la Budapeŝta terur-reĝimo, mi volas citi kelkajn eldiraĵojn.

Nia ruĝkruca kunlaboranto Mici Kóla:

“... la sagkruculoj ekzekutis homojn sur Danuba kajo: oni starigis ilin dors-al-rivere, kaj pafis tiel ke ili falis en Danubon. Unu fojon mi kaj Valdemar venis proksimen kaj vidis kio estas survoje. Ni kuris tien kaj montris ‘protekt-leterojn’ kaj povis per ili savi tiujn homojn.


Unu fojon sagkrucula hordo enrompis kaj minacis Valdemar-on dirante ke se li ne transdonos liston de la homoj al kiuj li donis ‘protekt-leteron’, lin trafos malbona sorto. Tiam Valdemar Langlet diris: ‘Nur trans mia morta korpo; se vi mortpafos min, vi ja ricevos ĝin.’ La sagkruculoj turniĝis kaj eliris.

Unu tagon sagkrucula hordo penetris en la monaĥinejon [Sacr  -Coeur], ili volis malplenigi ĝin kaj mortigi ĉiujn kaŝitojn. Nina kaj Valdemar Langlet staris ĉe la pordego kaj sukcesis savi la plej multajn.”

S-ino Margit Jaks-Ilg en Stokholmo diris en la jaro 1945 al sveda ĵurnalisto:

“... Se post la milito oni kanonizos novan sanktulon, estos Valdemar Langlet.”

*Tradukis Kalle Kniivil  *



**Vivsavilo**  
**de miloj,**  
**la protekt-**  
**letero de**  
**Sveda**  
**Ruĝa Kruco,**  
**nomata**  
**ankaŭ**  
**“Langlet-**  
**pasporto”.**



# La dua potenco de ESP

**“Esperanto” kaj “eksperimento” ambaŭ komenciĝas itale per “esp”. Tial esploristo Mauro La Torre povis potenci ESP per du en la nomo de nova propedeŭtika eksperimento, ESP<sup>2</sup>.**

**J**a la Esperanto-parolantoj estas certaj pri la utileco de sia lingvo, simile kiel la plejmulto de la ne-Esperanto-parolantoj trankvile kredas pri ties neutileco. En ambaŭ partioj oni ĉefe baziĝas sur tiel nomata *evidenteco*.

En nia lando (Italujo), kaj aparte en la pedagogia medio, similaj partioj kaj kontraŭpartioj ekestas de-temp-al-tempo pri enkonduko de komputiko en la lernejojn, modernigo de matematiko, forigo de latina lingvo k.s. Ĉe ni, en la lando de Galilejo, oni ne kutimas scienca alfronti la problemojn, objekte kontrolante la hipotezojn: oni nur emocie ŝveligas siajn sentaĵojn.

En ĉi tia kadro, mi laboras en universitata subfako, nomata *Laborejo pri Eksperimenta Pedagogio*, kies celo estas trakti la okazaĵojn kaj la problemojn pri klerigo kiom eble laŭ sciencaj metodoj. Tial ni ekpensis aranĝi instrui eksperimenteton, nomatan *ESP<sup>2</sup>*, pri la efikoj de E-lernado.

Dum la lastaj jaroj oni multe parolis, kaj iom esploris, pri la *lernfaciligo* (propedeŭtikeco) de Esperanto rilate la lernadon de aliaj lingvoj kaj eĉ de aliaj lernobjektoj. Ĉar la lernado de lingvo estas malsimpla plurfaca pro-

cezo, kiu analizeblas laŭ diversaj komponantoj (kapabloj vortaraj, gramatikaj, fonetikaj; pasivaj/aktivaj; praktikaj/teoriaj; ktp), kaj konsiderante niajn modestajn rimedojn, ni decidis alfronti peceton de tiu problemaro. Do la hipotezo kiun ni volas scienca esplori estas ke *lernado de la lingvo internacia (por italaj lernejoj) plibonigas la konsciigon pri la lingvaj modeloj ĝenerale, kaj speciale altigas la teoriajn sciojn ankaŭ pri la gepatra lingvo*.



**El Italio eliris ankaŭ la projekto Fundapax, kiun partoprenas Mihai Trifoi (Școală Generală Mikes Armin, RO-4038 Bixad, Jud. Covasna, Rumanio) kun siaj gelnantoj. Ĉu vi povas helpi ilin per didaktikaj materialoj aŭ ĝemeligo de lernejoj?**

## Somerkursoj per Esperanto

**Ekde 1990 cirkulas projekto de Antonio Alonso Núñez, prezidanto de Hispana E-Federacio, pri internaciaj someraj kursoj en Esperanto. Ŝajnas ke la plano nun finfine havas seriozan ŝancon realiĝi – almenaŭ se E-organizaĵoj rapide donos sian apogon.**

**Ĉ**e ni, en Galegio, de pluraj jaroj ne plu ekzistas eksplicita kontraŭstaro de kleruloj al Esperanto. La nuna rektora teamo de la Universitato de Santiago de Compostela estas preta subteni, ankaŭ finance, ĉiujaran okazon de senprofitaj E-Somerkursoj.

La duboj nun reduktiĝis al tio ĉu la E-uzantaro disponas la kapitalon homan kaj kulturen por tia rigore plenvalita klerigotasko, kaj ĉu ekzistas multnacia studentaro ema ricevi instruadon en Esperanto. Ni pruvu ke jes!

La strukturo de la E-Somerkursoj resumeblas jene. Diverslandaj gelnantoj kolektiĝos por studi dum unu aŭ pluraj semajnoj aron da temoj elekteleblaj (matematiko, historio, biologio ktp), laŭ kajeroj verkitaj de e-istaj fakuloj. Ĉi tiuj – aŭ aliaj samnivelelaj instruantoj – gvidos kursojn dum po unu semajno. La lernantoj ricevos diplomon, kies oficiala valoro dependos de la juĝo de eksteraj observantoj. La nivelo estos antaŭ-universitata aŭ universitat-prepara, kiu mankas en Esperantujo.

Sendube, nun estas tro malfrue por organizi la E-Somerkursojn dum somero 1995 en la origine planita amplekso. Tamen, eĉ modesta komenco valoras: provizore ni planas eldoni du studkajerojn, kaj venigi 10-20 gelnantojn por instruado dum unu-du semajnoj.

Ĉiu Esperanto-institucio (ŝtata, regiona, faka, loka, kleriga ktp) estas petata bonvole studi la eblecon financi al unu aŭ pluraj el siaj junaj membroj la vojaĝon kaj (malmultekostan) restadon dum 1-2 semajnoj en nia universitato. La preciza dato estas anoncota baldaŭ. Kontakto:

**Antonio Alonso Núñez**  
*Curso de Esperanto, Facultade de Filoloxía*  
 ES-15705 Santiago de Compostela (Hispanio)  
 tel./faks.: +34/81/598-005  
 retpoŝto: [ilganton@uscmil.usc.es](mailto:ilganton@uscmil.usc.es)



# Omaĝi al Cseh = avangardi

**La unua parto de la 10-aj Esperantaj Pedagogiaj Tagoj en Budapeŝto (25-26 feb.) pasis sub la signo de la Cseh-jubileo centjara.**

Post omaĝo al la forpasintaj kolegoj — inter ili Alfonz Pechan, redaktoro de la hungara-E kaj E-hungara vortaroj —, la ĉ. 60 partoprenantoj aŭskultis festparoladon de Éva Farkas-Tatár, mem Cseh-instruisto, kiu prezentis personajn rememorojn.

Dank' al Katalin Smidélus, ni povis vidi unikan ekspozicion. Ĉe Internacia E-Instituto en Hago ŝi kunesploris la postrestaĵojn de Cseh, parte hungarlingvaj. Oni retrovis i.a. du skatolojn da korespondaĵoj. Estis kortuŝe vidi nun leterojn el 1933, kiam la patrino de Cseh grave malsaniĝis kaj fine mortis, sed la filo pro manko de mono ne povis ĉeesti la entombigon. Similaj informoj devus esti kolektitaj en biografion dum ili estas ankoraŭ akireblaj. Aŭtune, okaze de la datreveno (Cseh naskiĝis la 12-an de septembro 1895),


aperos memorlibro kun kontribuoj de Marjorie Boulton, Duncan Charters, Stefan MacGill, Willem Roelofs, Humphrey Tonkin k.a., redaktita de Smidélus.

Post ĉi tiu historia parto Smidélus kaj Atilio Orellana Rojas (Argentino)

prezentis la metodon mem, la funkciadon de la teknikeroj en la praktiko. Fine Stefan MacGill analizis la Cseh-metodon. Laŭ li, en sia tempo ĝi estis tre avangarda, ĉar *cellingua*; tamen, ĝi celas ne rekte la komunikadon, sed priskribon de (nereala) mondo. Plej bona omaĝo al Cseh estas avangardi same kiel li, kio nuntempe signifas transpreni la bonajn elementojn el la Cseh-metodo kaj el aliaj metodoj.

*Jozefo Németh (Hungario)*

**La jubileanta  
Andreo Cseh  
(1895-1979)  
daŭre inspiras  
la metodo-  
logojn kaj  
instruistojn de  
la E-movado.**



# Jam pli ol 400 ekzamenitoj

**La ekzamenoj de UEA kaj ILEI sesiis rekord-kvante en la pasinta jaro: 12 fojojn, en 9 landoj de 4 kontinentoj.**

En 1994 ekfunkciis nova sekretario pri la elementa kaj meza niveloj, prof. Ivan Bekavac-Basić en Zagrebo. Ĝuste Zagrebo gastigis du sesiojn, en majo kaj decembro; la aliaj okazis en Jyväskylä (Finnlando), San-Francisko (Usono), La Chaux-de-Fonds (Svislando) kaj Seulo (Koreio) julie, en Ch'ŝnan, Kangnam (Koreio) kaj Bar-

laston (Britio) aŭguste, en Sète (Francio) kaj Togolando septembro, en Winneba (Ganao) decembre.

Aparte elstaris la 16 sukcesintoj — plejparte aziaj — dum la ILEI-konferenco en Kangnam, kaj la 8 junaj albanoj, ricevintaj elementan diplomon en Zagrebo. Entute 87 homoj kandidatis kaj 74 sukcesis (po 37 je

elementa kaj meza niveloj) en la ekzamenoj. Per tio la nombro de ĉiuj sukcesintoj de la UEA/ILEI-ekzamenoj ekde la komenco en 1989 altiĝis al 409.

Pasintjare ofte montriĝis ke la movadaj kaj literaturaj konoj de la kandidatoj ne atingas la nivelon de iliaj lingvokonoj. Pri tio oni povas iom helpi per aparta prepar-seminario, kaj antaŭ tri sesioj efektive okazis tia.


En 1995 oni povos ekzameniĝi dufoje en Zagrebo (6-7 majo, resp. 9-10 dec.), sed ankaŭ lige al diverslokaj movadaj aranĝoj, i.a.: blindula kongreso, Tuusula, 18-22 julio (Nora Moerbeek, Zwaansmeerstr. 48, 1946 AE Beverwijk, Nederlando); UK en Tampere; ILEI-konferenco, Övik, 29 julio - 4 aŭg. (ĉiuj tri aranĝoj en Finnlando); somerlernejo en Barlaston (Britio, 12-18 aŭg.); kongreso en Yangzhou (Ĉinio, septembro; prof. Zhang Danchen, Baiqu 14-dong, 34-hao, Huazhong Shifan Daxue, CN-430070 Wuhan).

Ĉiajn informojn petu ĉe la sekretario: prof. Ivan Bekavac-Basić, Kuŝlanova 59, HR-41000 Zagreb, Kroatio.

*Marija Beloŝević  
Sekretario de ILEI*

# Jarlibro survojas

Kiam tiu ĉi revunumero alvenas, *Jarlibro 1995* verŝajne jam survojas al vi. Ĝi do venkis la pasintjara Jarlibron per iom pli ol monato. Lastmomenta telefakso de UN-oficisto tamen kaŭzis prokrasteton, ĉar necesis forviŝi de la kovrilo la emblemon de la 50-jara UN. Ĝia apero en tia grandeco povus impresi, laŭ diro de tiu oficisto, kvazaŭ "la 50-jariĝa festado de UN apogus Esperanton". Ĉi-kune ni publikigas la kovrilon kun kiu la Jarlibro estus aperinta unu horon pli frue.



**La cenzurita kovrilo**



# Konversaciaj rondoj en UK

**Dum la UK-oj en Vieno (1992) kaj Valencio (1993) Andrzej Pettyn gvidis konversaciajn rondojn por kongresanoj. Jen liaj spertoj.**

**M**i spertis la bonajn kaj la malbonajn flankojn de la organizado de konversaciaj rondoj. Sincere dirite, mi pli bone memoras tion kio estis misa.

La kunvenoj okazis en plej diversaj horoj kaj eĉ en malsamaj salonoj. Tial la rondanoj kuris tien-reen, perdis tempon, koleriĝis. Siaflanke, la gvidantoj ne povis disponi eĉ pri minimumaj rimedoj kiel nigra tabulo. Krome, kvankam oni kutime organizas 3-4 grupojn, la interesiĝantoj ne estas informitaj pri la atendeblaj lingvonivelo kaj temoj, eĉ ne scias kiu estos la gvidanto. Ĝuste tial la rondanoj emas viziti diversajn grupojn unu post la alia, kio kreas malegalaĵojn.



Pettyn konversacias en rondo — ĉi-foje, en Staszów (Pollando).

Kion atendas la kursanoj, laŭ miaj observoj? Ili plej kutime volas ricevi konsilojn por bone ellerni, flue paroli kaj internaciece prononci Esperanton; ili ŝatas rekomendojn pri aĉetindaj lerniloj, vortaroj kaj simile; krome, kelkaj volas lerni kiel ili mem plej efike gvidu paroligajn ekzercojn en sia hejmloko.

En Tampere ni klopodu eksolvi la problemojn de la konversaciaj rondoj kaj adapti ilin al la bezonoj. Okazos, ĉiutage je fiksaj loko kaj horo (15.00), unusola konversacia rondo, kiun mi gvidos. Antaŭos ĝin, same ĉiutage (je 14.00), seminario por gvidantoj de konversaciaj rondoj.

Andrzej Pettyn (Pollando)

## Jubilea Cseh-vidbendo

**“Zamenhof kreis la lingvon, Andreo Cseh la metodon instrui ĝin, Audrey Childs-Mee prezentas profesion praktikadon de ĝi” — jene komenciĝas nova eldonaĵo de Internacia E-Instituto (Hago), manlibro por 18-hora vidbendo pri Cseh-kurso.**

**A**ntaŭ ok jaroj naskiĝis ĉe IEI la ideo pri filmo per kiu partoprenantoj de seminario pri Cseh-metoda instruado povus observi kaj analizi la trajtojn kaj principojn de la metodo. La celo estis filmi kompletan lingvokurson por komencantoj, gvidatan de la elstara Cseh-instruistino Audrey Childs-Mee. Pro ŝia subita morto (1990) pretiĝis nur prova surbendigo de pollanda kurso en 1988. Tamen, IEI decidis laŭeble utiligi la materialon kaj kompili por ĝi manlibron.

La surbendigita kurso troveblas sur 6 vidbendoj (VHS-PAL aŭ NTSC) kaj kostas 600 gld. Ĝi prezentas 12 renkontiĝojn, kovras preskaŭ duonon de la materialo de *Baza Cseh-kurso* de Andreo Cseh, kaj prezentas la teknikerojn de la metodo.

La manlibro plifaciligas metodologian analizon per mallonga pritrakto de gravaj trajtoj de la metodo. Troviĝas opinioj kaj rimarkoj pri la funkciado

de la metodo, ekz. inter lernantoj kun ne-hindeŭropa lingvo.

La materialon ni rekomendas precipe al pedagogiaj instancoj kiuj trejnas E-instruistojn. Ĝi povas esti utila informilo pri la Cseh-metodo, kaj bazo por leciono-analizoj. Sed necesas aldoni ke *por Cseh-seminaria laboro* nur kompetentaj gvidantoj aprobitaj de IEI rajtas uzi la vidbendojn. La bendoj ankaŭ ne estis produktitaj por anstataŭi veran kurs-estron dum grupa instruado. Tamen memlernantoj povas utiligi ilin kun akompano de bona ekzercaro.

La kompleto (filmo kaj manlibro) prezentas la ununuran filman ateston pri la laboro de la neforgesebla Audrey Childs-Mee. Servu ĝi kiel omaĝo al niaj gejubileuloj: la centjariĝanta Andreo Cseh, kaj Audrey Childs-Mee, kiu forpasis antaŭ kvin jaroj.

Katalin Smidélus, Internacia E-Instituto  
Rionustr. 172, 2585 HW Den Haag,  
Nederlando

## Plena Manlibro de E-Gramatiko

**Esperantio jam havas sian klasikan konsultverkon pri gramatiko...**

**P**lena Analiza Gramatiko de Esperanto (PAG) — pro sia pezo foje mokata kiel “kilogramatiko” — donas analizon kompletan, sed foje komplikan, pri la funkciado de nia lingvo.

Pro tio, de longe sentiĝas en Esperantio bezono por gramatiko pli praktika, pli facile konsultebla, pli travidebla por nefakuloj. Tian verkon produktis Bertil Wennergren (Sannadalsv. 4, 2 tr., SE-117 65 Stockholm, Svedio), kiu esperas trovi eldoniston por sia ampleksa manuskripto. *Plena Manlibro de Esperanta Gramatiko* (PMEG) uzas facile kompreneblajn terminojn, konsideras la reale uzatan lingvon, donas alternativojn ĉe dubaj punktoj, kaj ilustras la regulojn per abunda ekzemplaro. Specimenoj el ĝi jam aperis en numeroj de *TEJO Tutmonde*. ★



## Pri E-projektoj ĉe Unesko

**Mark Fettes, ĝenerala sekretario de UEA, vizitis la Parizan sidejon de Unesko la 31-an de marto, por starigi senperan rilaton kun ties respondeculoj pri lingvoinstruado, preparante la grundon por konkretaj proponoj esperantistaj.**

Fettes renkontis la asistan ĝeneralan direktoron de Unesko pri edukado, Colin Power, kaj la kunordiganton de la lingvoinstruaj projektoj de Unesko, Joseph Poth.

Power kaj Fettes priparolis la kunlaborajn rilatojn de Unesko kun UEA. Tuja interkonsento koncernis la partoprenon de UEA en Linguapax, programo celanta fortigi la ligojn inter lingvoinstruado kaj eduko je internacia amikeco, kiun lastatempe vigligas precipe katalunoj kaj aŭstralianoj. Tial Fettes letere petis Katalunan kaj Aŭstralian E-Asociojn kontakti la koncernajn instancojn pri kunlaboro.

Krome ili pritraktis jenajn eblajn projektojn:

- Plurlanda eksperimento pri E-instruado, kiu enplektu ne nur lernejojn sed ankaŭ esplor-institutojn pri edukado. Tian projekton preparas Hans Erasmus kaj Michael Cwik kadre de sia eŭropa agado. Ili planas peti subvencion de Sokrates, eduka programo de EU, kaj nun klopodas kontakti kunlaborantojn

en Aŭstrio, Francio, Germanio, Hispanio, Italio kaj Nederlando. Tian projekton, serioze preparitan, Unesko preskaŭ certe subtenus — ankaŭ finance.

- Internacia konferenco pri E-instruado, kun serioza klopodo venigi ankaŭ nemovadanojn. Tio povus esti preparokonferenco por la eksperimento, aŭ io tute sendependa. Laŭ Zlatko Tišljarić, kiu okupiĝas pri la projekto, la slovena registaro donus sian apogon. Ankaŭ Unesko ĝin subtenos post konkretiĝo de la planoj, se ĝin klare apogos unu aŭ pli da ŝtatoj.
- Starigo de reto de universitataj katedroj pri Esperanto, interlingvistiko kaj internacia lingva komunikado. (Ĉi tio estas ero en laborplano diskutota de eŭropaj landaj asocioj en la 2-a Esperanto Eŭropa Unia Kongreso, okazonta en Parizo inter la 2-a kaj 6-a de junio.) Tia reto certe bezonos plurajn jarojn por elkreski, sed indas teni la ideon viva ĉe Unesko. ★

## Nova TEJO-EJO

**TEJO en aprilo aliĝis al la Junulara Forumo de Eŭropa Unio. Ĉu ĝi sukcesos profiti de la novaj ebloj eŭropaj?**

Germana E-Junularo kaj -Asocio malfondis, ekde januaro, sian centran oficejon en Bonn. Tamen, restis tie kapabla kaj engaĝita teamo, kiu jam laboris por TEJO, kaj je nacia skalo atingis ministerian agnoskon kaj ŝtatajn subvenciojn. Ĉirkaŭ tiu teamo grupiĝas tuta deko da junaj aktivuloj.

Tiel povis fondiĝi, jam en januaro, Eŭropa Junulara E-Oficejo (EJO) de TEJO, kiu uzas la jam ekzistantajn kadron kaj adreson en Bonn. EJO celas kunordigi la junularan agadon rilate al EU, lobii ĉe EU-instancoj, serĉi subvenciojn, informiĝi pri ebloj financi seminariojn, publikigaĵojn kaj aliajn projektojn.

La unuaj signifaj subvencioj povos alveni nur en 1997. Ĝis tiam EJO bezonas financon subtenon de esperantistoj (UEA-konto "ejeo-u"), same kiel gazetojn de EU-landaj Esperanto-asocioj kaj ties informojn pri EU-rilataj enlandaj strukturoj kaj kunvenoj. Adreso: EJO, Rheinweg 15, DE-53113 Bonn, Germanio; tel. +49/228/235-898; faks. 232-764. ★

## INFORMADO

## Pretiĝu jam por Ago-Tago!

**En sia marta kunsido, la Estraro de UEA unuafoje oficiale fiksas la daton de la internacia Ago-Tago.**

La Ago-Tago, kiun de du jaroj aŭspicias la Informa Fakto de UEA, de nun okazos en la unua sabato de oktobro — kvankam eblas ĝin ŝovi al la apuda vendredo aŭ dimanĉo, kie tio pli konvenas. Ĉi-jare, do, la Ago-Tago okazos en la 7-a de oktobro, sabato.

La Ago-Tago celas prezenti la ekziston kaj valoron de Esperanto al kiel eble plej granda publiko. Ĝia natura celo estas la amaskomunikiloj. Ties atenton ofte kaptas ĝuste la informo ke grupoj diverslandaj kunordigas sian agadon: tio, ankoraŭ nekutima por multaj movadoj, montras la praktikan funkciadon de E-o. Kompreneble,

diversaj grupoj elpensas diversajn eventojn. Gravus du aferoj: sukceso kapti la publikan atenton, kaj kvalito de la prezentata bildo aŭ de la donataj informoj.

Estas utile trovi komunan mesaĝon, kiun ĉiu grupo povas prezenti al si alanda publiko. UEA rekomendas ke ĉi-jare tiu mesaĝo ligiĝu al la 50-jariĝo de Unuiĝintaj Nacioj, kiun oni aparte festos la 24-an de oktobro, nur du semajnojn post la Ago-Tago. La mesaĝo enhavu du klarajn konstatojn:

- Kvankam UN proklamas sian apogon al la homaj rajtoj, la paco kaj la monda demokratio, ĝi ankoraŭ faris nenion por krei la kondiĉojn de egaleca

komunikado inter ĉiuj popoloj, kaj anstataŭe apogas la superregadon de kelkaj "mondlingvoj", solvo ne nur maljusta sed ankaŭ kostega pro la postuloj de interpretado, tradukado kaj lingvolernado;

- Dum duoble pli longa tempo ol ekzistas UN, la E-movado praktikas kaj disvastigas modelon de vere justa kaj efika tutmonda komunikado, en kiu partoprenas homoj el ĉiuj mondopartoj kaj kulturaj fonoj, evoluigante propran internacian kulturon surbaze de la principoj de homaj rajtoj, paco kaj toleremo, kaj monda demokratio.

UEA instigas la landajn asociojn nomi jam nun siajn kunordigantojn por la Ago-Tago, kaj kontakti unu la alian kun informoj pri siaj planoj.

*Mark Fettes*

*Estrarano pri informado*



# 80-A UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO Tampere (Finnlando) 22-29 julio 1995

Foto: Studio B. Möller,  
Helsinki

## Adresoj

Konstanta adreso: CO de UEA (vd. kolofonon).

LKK: 80-a UK, PL 338, FI-33101 Tampere, Finnlando; telefakso +358 31 652 124.

## Aliĝoj

Ĝis la mezo de aprilo aliĝis pli ol 2000 personoj el 57 landoj. Tio aŭguras kongreson kun minimume 2500 partoprenantoj. Plej multnombraj estas, kompreneble, finnoj (240); sekvas germanoj kaj japanoj (po 158), poloj (157) kaj francoj (136). Grandnombre reprezentigas ankaŭ Rusio, Nederlando, Italio, Britio, baltaj kaj skandinaviaj landoj.

## Enveturo

Ĉar Finnlando ankoraŭ ne aliĝis al la traktato de Schengen, ankaŭ kongresanoj el landoj de Eŭropa Unio devas kunporti sian pasporton.

Bv. noti ke en la flughaveno de Tampere *ne eblas* ŝanĝi monon.

## Loĝado

Estas elĉerpitaj la lokoj en dultaj ĉambroj de la plej populara Hotelo Rantasipi kaj en unultaj ĉambroj de la samkategoria Hotelo Villa. En Victoria restas nur unultaj ĉambroj. Aliaj hoteloj plu ofertas liberajn lokojn.

**Malmultekostaj gastejoj:** Tute plenas la somerhotelo NNKY. Preskaŭ plenas la aliaj somerhoteloj kaj la junularaj gastejoj. Troveblas lokoj ĉefe en ĉambroj kun kvar (aŭ pli da) litoj.

Por la restantaj unu- kaj dultaj ĉambroj necesas tre rapida mendo.

## Antaŭ- kaj postkongresoj

Preskaŭ cent mendis la **antaŭkongreson** (17-22 julio, Turku), sed rapidaj aliĝantoj ankoraŭ trovos lokon.

**Postkongresoj:** Jam plenas la vojaĝo al Laponio, kaj apenaŭ restas lokoj en la busa ekskurso al Sankt-Peterburgo. Ĝin eblas mendi nur post konsultiĝo kun la Centra Oficejo. Iom da liberaj lokoj estas en la impresa ekskurso "Perloj de la lagoregiono", unu el kies celoj estos la surfota kastelo en Savonlinna.

## Ekskursoj

**Tuttagaj:** La plej granda intereso regas pri vizitoj al Raŭmo kaj Helsinki, sed ankaŭ la krozo laŭ la Arĝenta Linio estas tre populara. En ĉiuj ekskursoj haveblas lokoj.

**Duontagaj:** Alvenis pli ol 500 mendoj. Restas liberaj lokoj en krozado sur la lago, saŭnvizito, ekskursoj vesperaj kaj noktaj, kaj aliaj.

## Florsemajnoj

La kongresanoj povos ĝui la riĉan kaj dinamisman periodon de la florsemajnoj. La lokaj florvendistoj beligas la urbocentron, kaj dum la kongresa vendredo en la ĉefplaco pli ol 30 lokaj restoracioj vendos siajn specialaĵojn.

## Arta programo

En la riĉa arta programo oni povos ĝui la ludon de aktorino Jadwiga

Gibczyńska, kaj muzikan teatro-spektaklon de la fama Sankt-Peterburga E-teatro, kiu ĝis nun ne prezentiĝis en UK-oj. La muzika programo konsistos el renomaj grupoj kaj solistoj: Kajto, Persone, Asorti, Ĵomart kaj Nataša, de Ruyter, Le Puil, Puhova, Bronštejn, Alaniz, kaj pluraj aliaj konataj artistoj movadaj.

## Aliĝkotizoj

Parenteze aperas kotizoj por la landoj kun tarifo B. Individua membro de UEA (IM) 324 ned. gld. (242); ne-IM 402 (302); komitatano/kunulo/junulo/handikapulo 162 (121); ne-IM kunulo/junulo/handikapulo 242 (182). ★

## Universitataj kursoj

Por la unua fojo eblos viziti universitat-nivelajn kursojn dum UK, eĉ ekzameniĝi pri ili. Okazos du kursoj, 4 x 90-minutaj, de Akademio Internacia de la Sciencoj: "Enkonduko al astronomio kaj astrofiziko" (gvidos profesoroj Amri Wandel kaj Hans Michael Maitzen) kaj "Enkonduko en la komputikon" (gvidos d-ro Mauro La Torre). La kursoj ebligas profundan studon, sed estos kompreneblaj por laikoj. Aŭskultontoj kiuj volas ricevi oficialajn universitatajn poentojn kaj ekzameniĝi, bv. antaŭanonci sin al prof. d-ro Hans Michael Maitzen (Endemanngasse 6-18/1/24, AT-1230 Wien, Aŭstrio).



# Pledo por sociologio de la Esperanto-movado

**Nia revuo de tempo al tempo publikigas verkojn premiitajn en Belartaj Konkursoj. Ĉi-foje ni aperigas la eseon venkintan en 1994, per kiu Nikola Rašić gajnis la premion Luigi Minnaja. Kroma merito de lia eseo estas ke ĝi servos enkonduke al lia samtema libro baldaŭ aperonta ĉe Edistudio, *La rondo familia*.**

“Ni malkonscias ĉu ni ĝin konstruis  
Aŭ ĝi donis sian animon al ni.”

VLADIMIR NAZOR: *Pri la lingvo*

Vidi propran reflektiĝon en la sociologia spegulo estas en Esperantio ĉiam latentata sed ankoraŭ neplenumita bezono. Samkiel ĉiu persono ŝatus scii kion pri li aŭ ŝi la aliaj — “tute objektivaj” — opinias, ankaŭ sociaj kolektivoj havas tiun bezonon pri eksterigita memkonscio. Kio ni efektive estas, kion ni mem pri ni opinias, kiel la aliaj nin vidas? Kompreneble estas ankaŭ aferoj kiujn la membroj de difinita socia grupo simple ne volas scii pri si mem, ia kaŝita grupa subkonscio, kiu ofte ekscitas la esploristojn eĉ pli.

Scivolemo por ricevi fidindajn respondojn al similaj demandoj gvidis la unuajn esploristojn.<sup>1</sup> Fidindajn, ni diras, ĉar ekde la komenco estis fakte tro da jam pretaj formuloj, esprimantaj pli la dezirojn ol la efektivon, pli proksimaj al memkreitaj mitoj ol al senpasiaj faktoj.

Sed kiel efektive statas la aferoj pri niaj sociologiaj esploroj? Ni komencu per pesimisma aserto de unu el la plej trafaj studintoj de la temo:

“Ĉiuj sociologi-karakteraj studaĵoj pri Esperantio komenciĝas per la ekskruza plendo: ne ekzistas sociologiaj esploroj, priskriboj, indikoj konfi[di]ndaj pri Esperantio ktp. Temas pri pli ol tio: en Esperantio nuntempe mankas praktike ĉiuj... instrumentoj por science fundamenti sociologian analizon.”<sup>2</sup>

Per tia lamento movada sociologo Sándor Révész komencas unu el siaj sociologiaj tekstoj pri Esperantio. Ni povas nur konsenti. Tamen ne plene. Estas ja sociologiaj studoj pri Esperantio, sed ne vere multaj. Ili ankaŭ ne ĉiam estas veraj esploroj en la metia senco, ne vere kaj ne ĉiam ĝuste sociologiaj. Aŭ almenaŭ ne precipe sociologiaj. Iliaj kvalito kaj atingoj estas tiaj kiaj ili nur povas esti en komunumo kun manpleno da sociologoj, do en socio praktike sen tiuspeca profesia kolektivo kaj sen koncerna faktradicio.

Sed tio estas kion ni havas, kaj sur tio oni devas plu konstrui. La ekzistantaj esploroj, kun ĉiuj siaj nekontesteblaj virtoj kaj neprisilenteblaj mankoj, havas tamen valoron. Ili instigas al kreo de kritika memkonscio en la Esperanto-movado, kio estas aparte grava en ties dua

jarcento, kiam ĝi devas eliri el sia legenda, ideologia fazo por serĉi pli firman ankron en la modernaj cirkonstancoj. Tiuj esploroj, per la simpla konvink-forto de sia faktecio, estas valora testilo pri la valideco de la movadaj idealoj kaj pri la realo de ties aktualo; pri la potencialoj kaj pri la perspektivoj.

Tamen ankaŭ Révész grandparte pravas asertante ke en nia kulturo mankas kondiĉoj por fundamenti sociologian analizon. Mankas prilaboro ne nur laŭ diversaj sciencaj disciplinoj\*, sed ankaŭ laŭ temoj. Ni nur memoru ke ni praktike ne havas freŝdatan historion de la movado kiel tuto, sed ankaŭ ke mankas ekzemple: historio de UEA.


Kurioze sed vere. Apud pluraj, ofte brilaj, priliteraturaj eseoj, ni fakte ne havas propran literaturan kritikon, por ne paroli pri literatur-historio, sociologio de literaturo (defio pli interesa ol unuavide ŝajnas!). Jes, estas multaj elementoj por komenci, sed la sintezoj ankoraŭ mankas.

La manko kiun mi pleje sentas estas tiu de la historio de ideoj. La socia idearo (“filozofio”, se vi volas) de Zamenhof, Lanti, Privat — por menciigi nur la plej gravajn — estis kromtuŝo de iliaj biografioj, sed malofte objekto de apartaj studoj, kiuj klopodus ne nur sistemigi la bazajn konceptojn, sed ankaŭ analizi ilin en la kunteksto de ilia tempo kaj ties ideoj fluoj. Ĉar ĉiuj niaj studoj, eĉ kiam tre kvalitaj, montriĝas nekuraceble endogenaj.

Tiu ĉi tre provizora listo de forestaĵoj en nia literaturo (kaj en

nia spirita kulturo ĝenerale) ilustras kiom malprave kaj kiom frue estas tro esperi pri kontentigo de la bezono pri la menciitaj sintezoj en relativa baldaŭo. Tiuj sintezoj ankaŭ ne venos de si mem, sed devus aperi kiel frukto de longdaŭra kaj planata teama laboro. Se mi ne eraras ke tiu bezono pri tiuspeca sintezo estas reala, kaj ke la movada memkonscio eniras la fazon kiam ĝi postulos plenumon de tiu bezono, ne devus pasi longa tempo ĝis iniciato pri simila projekto aperos.

Kvankam ĉiu tia projekto sendube devos bazi sin je historiaj analizoj, je profunda studo kaj taŭga valorigo de la heredaĵo, ĝia vera senco troviĝas en la futuro. La aktuala signifo kaj la estonteco de Esperanto dependos de tio kiom ni kapablos projekcii la kunportatan heredaĵon en la tempon kiu venas. Nun jam estas evidente ke “en la mondon venis nova sento”. Ĉu ni sukcesos rekonigi ĝian ritmon?



**En Esperantio nuntempe mankas praktike ĉiuj instrumentoj por science fundamenti sociologian analizon.**



# Por volumo kvindeka kaj plu

**La grandega donaco kiun Itô Kanzi el Kioto, sub la programa pseŭdonimo Ludovikito, malavare donadas al ni ekde 1973, konsistas el ĝis nun 49 volumoj, nigraj kaj flavaj.**

**K**ion entenas tiuj 300- ĝis 500-paĝaj volumoj? Temas i.a. pri:

- ĉiuj ĝis nun trovitaj verkoj de Zamenhof (originalaj, tradukaj; kongresparoladoj, leteroj; multaj publikigitaj la unuan fojon);
- signifaj nezamenhofaj materialoj, kiuj prilumas gravajn eventojn, ekz. la Ido-krizon;
- materialoj pri la esploroj lige al la pretigado de la unuopaj volumoj (ekz. korespondaĵoj de Ludovikito kun Waringhien kaj aliaj esperantologoj);
- tre preciza biografio de Zamenhof el la plumo de Ludovikito mem, krome diversaj biografetoj de aliaj aŭtoroj;
- represoj kaj fotoreproduktoj de titoloj de gravaj tekstoj kaj broŝuroj (inkluzive de lerniloj kaj vortaretoj diverslingvaj) el la unuaj jaroj de Esperanto;

- la jarkolektoj de la revuo *Lingvo Internacia*, adresaroj k.s.

Preskaŭ ĉiu volumo entenas el la plumo de Ludovikito prefacon, postparolon, studetojn, notojn, rimarkojn, indeksojn, listojn k.s.

Ĉio ĉi estas neelĉerpebla fonto por multegaj esperantologiaj kaj zamenhofologiaj studoj, impona monumento pri la unuaj jaroj de la Esperanta kulturo, kaj materialo kun grandega scienca valoro.

Atenta observanto certe jam delonge demandas sin kiel entute eblis al unusola homo realigi tian programon ne nur fizike sed ankaŭ finance. Malgraŭ kelkaj premioj kaj subvencioj, la ĉefan ŝarĝon ja portis "la poŝo de la emérito".

Ĉu ne jam delonge venis la momento je kiu ni ne nur admiru la volumo-torenton, sed pli aktive ol ĝis nun subtenu ĝin?

Kompreneble, unuavice necesas aĉeti la nigrajn kaj flavajn volumojn. Ni tamen faru pli, ĉar la perspektivo de la entrepreno estas necerta: mankas mono por daŭrigi la dokumentan parton de la serio, la volumojn de *Ludovikologia Dokumentaro*, eldonata kompletige al *Plena Verkaro de Zamenhof* (PVZ). Dum pretas deko da manuskriptoj por eldono, ilia financado por Ludovikito simple ne plu estas ebla.

Ni do alvokas vin kunhelpi, por ke la grandioza intelekta kaj editora fortoŝtreĉo de tiu unu sindonema individuo, tiu volumaro kiu estas unu el la plej bonaj pruvoj al skeptikuloj ke Esperanto ekde la unuaj momentoj de sia ekzisto estas kultura lingvo, por ke tiu libre bindita tradicio de nia lingvo trovu sian finrealiĝon. Pro tio ni proponas subtenon per mondonacoj, sendotaj al la UEA-konto "kanz-w".

*Wera kaj Detlev Blanke (Germanio)*

**Red.:** En la konto de Ludovikito ĝis nun kolektiĝis ĉ. 4500 gld., donacitaj i.a. de A. Albault, D. kaj W. Blanke, R. Corsetti, W. Harmon, R. Makabe, T. Masako, S. Milojević, O. Reiersøl, W. Roelofs kaj K.-H. Schaeffer.

Kaj fine: kial sociologio de la E-movado? Kaj kia sociologio? — ĉar tio tre dependas de la difino de la E-movado.

Ekde la komenco ekzistas du konceptoj pri esperantismo. Laŭ la unua, esperantisto estas persono kiu parolas Esperanton<sup>3</sup>. Punkto, fino. Laŭ la dua, esperantisto estas persono kiu sentas apartenon al la Esperanto-komunumo, kiu sentas solidarecon kun ties membroj, kaj kiu dividas kun ili diversajn komunajn ideojn<sup>4</sup>.

Laŭ la unua koncepto Esperantio estas nur lingva komunumo, ne pli firma sed verŝajne same loza socia grupo kiel ekz. grupo de nedenaskaj parolantoj de iu ajn alia lingvo. (La sekundaraj parolantoj de la itala ne fariĝas italoj per la ellerno de la itala lingvo, ekzemple.) Tiuj ĉi ne sentas bezonon evoluigi iun apartan socian identecon kiel parolantoj de Esperanto.

## Lingvo kaj kolektivo

Sociologio bazita je tia difino estas fakte limigita al lingvo-sociologio kaj (parte) al socio-lingvistiko. Tiuj du disciplinoj esploras kiom la lingvo influas la socian kolektivon kaj, inverse, kiel la kolektivo influas la lingvan evoluon<sup>5</sup>.

La adeptoj de la dua koncepto (nomu ĝin raŭmismo, se vi volas, kvankam ĝi ekzistis multe pli frue ol raŭmismo metis ĝin sur sian standardon) sentas la kolektivon de Esperanto-parolantoj io pli ol nura lingvo-komunumo. Por ili Esperantio estas alternativa socio, kiu kreis alternativan kulturon. Pseŭdo-socio, pseŭdo-nacio<sup>6</sup>, diras iuj.

Laŭ tiu ĉi difino la tereno por sociologia esploro estas multe pli vasta, preskaŭ kiel en ĉiu alia socio. Precipe multa laboro troviĝus por mikro-sociologoj, etno-metodologoj<sup>7</sup>, sociologoj de kulturo, sociaj psikologoj (kaj psiko-sociologoj), kaj kultivantoj de kelkaj aliaj disciplinoj. La lingvo-sociologia aspekto estas ĉi tie nur unu el pluraj, kvankam sendube ankoraŭ masta kaj eksplikaj la plej potenca.

Diference de nura lingva kolektivo, tiel ĉi formita grupo havas ankaŭ memkonscion, sian "mi-senton", kio postulas ke ĝi havu propran historion kaj propran historiografion; siajn ideologiajn kaj aksiologiajn\*\* sistemojn. Ĝi kreas kaj donas socian signifon al propraj instituciaj strukturoj; ĝi havas siajn elitojn, mezklasulojn kaj sian plebon, do siaspecan socian distavoliĝon. Tia grupo sekve havas ankaŭ sian politikon, kun ĉiuj ties implikoj kaj facetoj. Fine, la grupo posedas proprajn spiritajn superstrukturojn: jurajn (la Fundamento, manifestoj, programoj, regularoj, statutoj, strategiaj planoj); religiajn (interna ideo, hilelismo/homaranismo, kiuj konstante resonadas ne nur en la Esperanta sed ankaŭ en diversaj religiaj movadoj: bahaismo, Oomoto k.s.), literaturajn, filozofiajn ktp ktp.

Ĉio ĉi evidente plilarĝigas la kadrojn kaj taskojn por sociologio de tiel difnita E-movado (fakte: E-socio). Efektive la lingvo-grupaj aspektoj pli multe promesas al (socio)lingvistoj ol al sociologoj. Malmultaj el la esploroj pri la E-movado okupiĝas ĝuste pri lingvaj demandoj, sed ja regule pri soci-demografia strukturo, valoroj, opinioj, motivoj, sintenoj, kaj aliaj faktoroj per kiuj oni efektive



povas difini socian grupon, pli vaste ol kiel nuran lingvo-kolektivon. (Esence, grupoj nur lingvaj ne ekzistas, ĉar membroj ĉiam kunportas la tuton de siaj sociaj spertoj.)

La diskuto kaj disputo inter la adeptoj de la du konceptoj — tre kondiĉe ni nomu ilin *raŭmismo* kaj *instrumentismo* — foje akiras formojn de malakordo pri bazaj principoj. Tial, en la ardo de disputoj, oni foje forgesas ke ne eblas neglekti ke esperantistoj ja formas lingvan kolektivon, sed same ne eblas ne vidi ke ĝi estas io pli ol sole lingva grupo.

La Esperanto-komunumo ekzistas kaj vivas kiel tre karakteriza socia fenomeno. Ankaŭ la adeptoj de la “instrumentismo”<sup>8</sup> koncepto apenaŭ povas uzi la lingvon ekster la komunumo, aŭ almenaŭ devas intense rilati kun ĝi, se ili efektive uzas la lingvon. Ĉu la lingvo entute povus vivi kaj evolui sen havi kultur-genere kapablan komunumon malantaŭ si?

### Ĉu Fina Malvenko?

El tiu demando venas ankaŭ la unua kaj baza kontraŭdiro de la nuntempa pozicio de Esperanto: lingvo kiu celis fariĝi helpa, komplementa, dua lingvo de la homaro, fakte fariĝis unua lingvo de fermita minor-nombra kolektivo. Fermita ĝuste per sia lingvo. Ĉu la raŭmismo estas efektiva kaj definitiva akcepto de la Fina Malvenko aŭ ĝi estas tendenco kiu kaŭzis (interalie) la malvenkon? Aŭ simple produkto de la malvenko? Lingvo kiu celis konkeri la mondon kreis sian propran mondon. Ĉu nur provizore, atendente pli bonajn tempojn? Aŭ temas pri nova evoludirekto de la Esperanto-movado? Ĉar la komunumo kiel tia ekzistis jam de la komenco, kun tre forta “mi-konscio” (nomata “interna ideo”). La grava diferenco estas en tio ke la raŭmismo proklamis ĝuste tion — la ekziston de “indigena” kaj aŭtentika socia kolektivo, en kiu la lingvo funkcias kaj kiu la lingvon funkciigas — “Fina Venko”<sup>9</sup>, se ni rajtas iom simpligi la ĉefan ideon.

Tiel strukturita kolektivo evoluigas fortajn spiritajn interligojn: konvinkojn, sintenojn, komunajn ideojn kaj idealojn, diversajn formojn de “mi-” kaj “ili-konscio”. Estas sendube ke tian mikro-etoson kreas la membroj de la grupo mem, pro la bezono firmigi la rezistokapablon de la grupo, sed ankaŭ evidentas alia direkto de la influo: ke la interna kulturo modifas la antaŭajn sintenojn kaj konduton de siaj adeptoj/kreantoj.

Tial unu el la ĉefaj demandoj por esploroj de Esperantio kaj esperantistoj povus esti: kiaj personoj estas la esperantistoj? Aŭ pli rekte kaj pli grave: ĉu tiuj personoj estas tiaj ĉar ili estas esperantistoj, aŭ ili fariĝis esperantistoj ĉar ili estas tiaj personoj, ĉar ili havis inklinon (pro la jama strukturo de sia personeco) al tia elekto? Kompreneble, temas fakte pri la rilato de proporcioj: kiom ni mem kreas Esperanto-kulturon kaj en kia grado ĝi influas nin? Similan demandon starigis al si la kroata poeto Nazor, kantante pri sia gepatra lingvo kaj la rilato al ĝi: “Ĉu ni ĝin konstruis, aŭ ĝi donis sian animon al ni?”

Nikola Rašić (Nederlando)

### NOTOJ

\**disciplino* = sciencobranĉo

\*\**aksiologia* = rilata al valor-sistemo

1. La unuan profesion statistikan esploron faris prof. Johannes Dietterle en 1927 (*Esperanto* 335/336, jul.-aŭg. 1928, p. 134-156). La unua sociologia enketo estas la diplomlaboraĵo (1927) de Reuben A. Tanquist, usonano (1897-1993), en Universitato Minnesota. Poste sekvis deko da esploroj, el kiuj plej bone dokumentitaj estas tiuj de Peter G. Forster (*The Esperanto Movement*, Den Haag/Paris/New York: Mouton, 1982) kaj de M. Durnová (*Sociologia esploro de sintenoj al Esperanto*, Praha: Ĉeĥa E-Asocio, 1981).

2. Sándor Révész: *Esperantio: sociolingva meditaĵo*. En: Czesław Biedulski (red.): *Strategiaj demandoj de la Esperanto-komunumo*. Varsovio: Pola E-Asocio, 1985.

3. Deklaracio pri la e-ismo de la kongreso en Bulonjo: “La Esperantismo estas penado disvastigi en la tuta mondo la uzadon de lingvo neŭtrale homa...” “Esperantisto estas nomata ĉiu persono, kiu scias kaj uzas la lingvon Esperanto, tute egale por kiaj celoj...”

4. Vd. la Manifeston de Raŭmo en *Kontakto* 1981/1, p.6; represetita en *Esperanto* 1030, okt. 1991, p. 188.

5. Efektive, ekzistas kelkaj bonaj studoj pri tiu aspekto, ekzemple disertacio de François Lo Jacomo (*Liberté ou autorité dans l'évolution de l'espéranto*, Parizo: la aŭtoro, 1981).

6. Ŝajnas ke la unua kiu uzis tiujn du nociojn estis Révész.

7. Verŝajne la unua “etno-metodologia” monografio estas tiu pri Kultura Centro E-ista en La Chaux-de-Fonds (Lilli Papaloizos: *Ethnographie de la communication dans un milieu social exolingue*, Berne: Peter Lang, 1992).

8. Osmo Buller (“Prefere instrumentalismon!”, *Literatura Foiro* 91, junio 1985, p. 12-15) fajne montras ke la rilato inter la du konceptoj ne estas tiom simpla ke eblus strikte apartigi ilin. Ankaŭ la Proklamo de Voss (*Esperanto* 1030, okt. 1991, p. 189) esence pledas por la kombino kaj kreiva interagado de la du konceptoj (strategioj?), kvankam klare favorante la “finvenkismen”, vidante en raŭmismo nur formon de kvalita — necesa sed tamen provizora — subteno al ĝi.

9. La esenco de la diferencoj inter la du konceptoj tre trafe esprimis Giorgio Silfer en letero al la redakcio de *Esperanto* (1036, apr. 1992, p. 78), reage al Stefan MacGill, apoganto de la Proklamo de Voss: “MacGill rajtas peni, por ke ju pli multaj ni estus, des pli multaj premu ĉe la institucioj; Silfer rajtas labori, por ke ju pli multaj ni estus, des pli multaj vivu nian vivmodelon. MacGill rajtas revii ke iu mikrosocia idealo transiru al makrosocia realo; Silfer rajtas revii ke la makrosocio ne malhelpu la kreskon de ideala mikrosocio”. Szilvási (“Esperanto-popolo: ĉu subkulturo, etno aŭ ĉu nacieco?”, *Eventoj*, julio/2 1992, p. 2) rezonas simile. Li konkludas ke la esperantistoj posedas ĉiujn trajtojn de nacio (komunaj lingvo, historio, kulturo k.s.), krom la elemento de komuna deveno. Sed tiu elemento ja ne plu rolas en la nuntempa mondo de intensa internacia migrado kaj kreiĝo de pluraj mikso-devenaj nacioj. Szilvási konkludas ke ĉar en baldaŭa estonteco reale ne okazos la “fina venko” — se “ni ne volas malaperi simile al multaj malaperintaj en historio naciecoj, eĉ nacioj, se ni volas paŝi al iu kvalite (!) pli alta ŝtupo, ni devas zorgi pri tio, ke la novaj esperanto-parolantoj iĝu esperantistoj, do ni devas zorgi pri ilia edukado!”

“Juna estas tiu, kiu sentas sin tia...”



MEJS

Mez-Eŭropa Junulara Semajno  
1995


INTERNACIA  
JUNULARA  
SEMAJNO

08-15 aŭgusto 1995, Tata, Hungario

Kontakto: Hungara Esperanto-Junularo,  
pk. 87, H-1575 Budapest, Hungario



# Laste aperis



**Aforismoj kaj tekstoj de Constantin Brâncuși** (1876-1957). Kolektis Constantin Zărnescu. El la rumana trad. Ionel Oneț. Berkeley: Bero, 1994. 35p. ISBN 1-882251-10-5. 28x10cm. Pensoj de rumana skulptisto-filozofo. 11,70 gld.

**Almanako Lorenz 1995**. Rio de Janeiro: Spirita Eldona Societo F.V. Lorenz, 1995. 96p. 21cm. Artikoloj, eseoj kaj poemoj plejparte spiritismaj. 8,10 gld.

**Ariadna faden. Universala Alfabeto Nomaro-Adresaro (ANA)** (1914-1917). Vladimir F. Szmurlo (1865-1931). Editoris Sergej N. Kuznecov. Moskvo: Impeto/Ruthenia, 1993. 20+124p. ISBN 5-7161-0001-5. 21cm. Reeldono de la unua provo krei enciklopedion pri Esperanto kaj esperantismo. 7,50 gld.

**El verkoj de E. Lanti** (1870-1947). Vol. 1. Laroque Timbaut: Laŭte, 1991 (2-a eld.). 168p. 21cm. Artikoloj kaj leteroj de la disvolvinto de la sennaciismo. 15,30 gld.

**El vivo de la ĉukĉoj**. Vasilij Eroŝenko (1890-1952). Moskvo: Impeto/Ruthenia, 1992. 47p. 21cm. Skizoj kuraĝe priskribantaj la vivon de nord-siberia popolo dum la Stalina reĝimo, aperintaj brajle en 1933-1947. 4,50 gld.

**Malbeno kara** (1924). Mary Webb. El la angla trad. Grace Kirkwood. Editoris Donald Broadribb. Beverley & Bakers Hill: Bookleaf, 1994. 120p. ISBN 0-646-20940-X. 30cm. Romano en dialekta lingvaĵo, situanta en la 19-a-jarcenta Anglio. 43,50 gld.

**Mistero de la malnova domo, La** (1989). Stefan Ĉirpanliev. El la bulgara trad. Georgi Mihalkov. Sofio: Pres-Esperanto, 1992. 12p. 19cm. Ilus. Fabelo pri "avino Kukuljazka". 4,20 gld.

**Nesto de viperoj**. István Nemere. Moskvo: Impeto, 1994. 181p. ISBN 5-7161-0006-6. 20cm. Okazas murdo je verkisto Theo Velmer. Aŭ...? 18,00 gld.

**SEJM. Historia skizo**. Dmitrij Cibulevskij (1946). Moskvo: Impeto, 1994. 204p. ISBN 5-7161-0008-2. 21cm. Historio de Sovetia E-ista Junulara Movado (1965-1979), kun multaj dokumentoj kaj fotoj. 9,60 gld.

**Yumeiho-terapio. Orienta speciala diina masaĝo**. SAIONJI Masayuki (1943). Kędzierzyn-Koźle: Mono, 1994 (2-a eld.). 159p. 21cm. Ilustrita manlibro pri terapio sistemigita de la aŭtoro el la tradicia masaĝarto. Apendico donas ekzercojn por la propra korpo. 21,00 gld.


## DIVERSAĴOJ

**Kasedo: Esperanto el Sarajevo. Vol. 1 kaj 2**. Dek ses elsendoj de Radio Sarajevo en Esperanto inter aŭgusto 1994 kaj januaro 1995. 2 x 60 min. 30 gld.

**Kasedo/Kompakta disko: Vinilkosmo-kompil'. Volumo 1**. Donneville: Eurokka, 1995. 59 min. Muzika vizitkarto E-lingva de 15 rok- kaj pop-grupoj kaj kantistoj: Kajto, Persone, Solo, La Alburnoj, La Rozmariaj

Beboj ktp. Kun tekstokajero. Kasedo: 23,10 gld. K-disko: 39,00 gld.

**Vidbendo: Orienta speciala diina masaĝo**. Tōkyō: Internacia Instituto de Preventa Medicina Praktiko, 1995. La koksosto-ĝustiga premkneda terapio de SAIONJI Masayuki. PAL. 81,00 gld.



**"La uzado de tiu ĉi disko por publika disaŭdigo estas deviga" — instigas la unua kompakta disko de Eurokka, faka asocio de TEJO.**

**MENDU ĈE LA LIBROSERVO DE UEA**, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Bonvolu atenti ke al ĉiuj netaj prezoj de libroj sendotaj al adresoj en Eŭropa Unio aldoniĝas 6%, al tiuj de diskoj, insigno k.s. 17,5% pro la aldonvalora imposto. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas 10% por sendokostoj. Minimumaj sendokostoj estas 5 gld. Antaŭdankon pro via mendo!

## Libroj el Sarajevo ree haveblaj

**Kiam William Auld recenzis antaŭ du jaroj *Antologio de la moderna bosnia-hercegovina novelo* (okt. '93, p. 175), tiu libro fakte ne plu estis mendebla ĉe nia Libroservo. Sed ĵus, unufoje post pli ol tri jaroj, denove atingis nin libropakaĵoj el Sarajevo — post komplika, plurmonata vojaĝo. Ree disponeblas do ĉe UEA jenaj eldonaĵoj de Esperanto-Ligo de Bosnio kaj Hercegovino, pluraj je pli malalta prezo ol ĝis nun:**

**Antologio de la moderna bosnia-hercegovina novelo**. Komp. Ĝemaludin Alić. 1989. 178p. Dudek kvin rakontoj el la 20-a jarcento. 33,00 gld.

**Ĉevalsalto**, La. Petar Mišković. Trad. Senad Ĉolić. 1986. 88p. Ilus. Pri la aerinvado al Drvar en 1944. 15,00 gld.

**Derviŝo kaj la morto**, La. Meša Selimović. Trad. Roger Imbert. 1990. 310p. Pri la vivdilemoj de islama monaĥo, ĵetita kontraŭvole mezen de potenclukto en la turka imperio. 66,00 gld.

**Familio Talhe. Ŝedrvangardeno**. Irfan Horozović. Trad. Vesna Skaljer-Race. 1991. 116p. Galerio de portretoj el imagita genealogio, esploro pri la senco de la estado. 33,00 gld. (Vd. recenzon sur p. 92.)

**Hasanagaino**. Trad. Fran Janjić. 1975. 44p. Ilus. Bosnia popola balado. Dulingva eldono. 4,80 gld.

**Jezik i međunarodno komuniciranje**. Red. Senad Ĉolić. 1986. 222p. Prelegaro de simpozio pri lingvo kaj internacia komunikado, kun resumoj en Esperanto. 40,50 gld.

**Komedio de eraroj**, La. William Shakespeare. El la angla trad. William Auld, Atanas Simeonov. Glasgow-Sarajevo: Kardo-ELBiH, 1987. 88p. Frua komedio, pri duobla identec-konfuzo. 15,90 gld.

**Legindaj partizanoj**, La. Branko Ĉopić. Trad. Branko Miljko. 1987. 76p. Nove-laro pri milito. 18,00 gld.

**Simha**. Isak Samokovlija. Trad. Jovan Zarković. 1988. 110p. Malriĉa ŝuisto trovas meze de la vivdezerto "oazetojn de ĝojo kaj feliĉo". 21,00 gld.

**Sociaj aspektoj de la Esperanto-movado**. Red. Senad Ĉolić. 1988. 136p. Referaĵoj de internacia kolokvo en 1987. 22,50 gld.

**Soifo**. Ivo Andrić. Trad. Ladislav Režek. 1988. 64p. Kvin noveloj de la bosnia Nobel-premiito. 12,00 gld.

**Ŝtona dormanto**. Mak Dizdar. Trad. Jovan Zarković. 1989. 94p. Kompleksa poezia vizio pri la mezepoka Bosnio. 14,70 gld.


**39 modernaj poetoj**. Antologio de la postmilita bosnia-hercegovina poezio. Komp. Ivan Kordić. Trad. Ladislav Režek. 1985. 110p. Okdek naŭ poemoj de 39 poetoj. 15,00 gld.

**Vizaĝoj**. Ivo Andrić. Trad. Roger Imbert. 1981. 61p. Ok noveloj. 7,50 gld.

Ĉiu aĉeto de la ĉi-supraj titoloj signifas helpoj al Esperanto-Ligo de Bosnio kaj Hercegovino.



# Esperanto en radio



## Babelismo aŭ interplektiteco

**Babelismo floras en la moderna mondo, ne nur ĉar mult-nombras la lingvoj, sed ankaŭ ĉar, ene de iu lingvo-komunumo, disas la lingvaĵoj, la interesoj, la koroj.**

Ni ne konas unu la alian, ne havas tempon enprofundiĝi en la penson de aliulo, sintezi ĉiujn ricevatajn sciigojn, eksentojn kaj opiniojn. Fakte la konsekvencoj de nia ekologikonscia kulturo, kaj de nia emo al senlima malfermiteco, havas du flankojn: aĵa riĉeco, sed mensa malordo.

Nu, por tion kuraci, Esperanto povas aperi kiel ejo de raciigo, de natura konfrontigo kaj harmoniigo, komuna domo por malbabeliĝi.

### Babela Esperantujo

Sed maltaŭga diseco prosperas ankaŭ en Esperantujo. Bunteco kaj diverseco ne kulpas: ili ja apartenas al nia idearo, al la interna ideo. Sed draste ne sufiĉas fortostreĉoj de kelkaj el ni por interplekti ĉiujn iniciatojn.

Eble la esperantistaro mem timas la unuiĝon, kaj tiel suferas plu la Babelan malbenon samkiel la ekstera mondo. Ĉirilate, institucia unueco, pere de membreco al centra organizaĵo (ekzemple UEA), kvankam grava atingo, ne sufiĉas: entute ĝi konsistigas nur unu elir- kaj alir-punkton. Dume, kaj iom paradokse, por esti solida kaj resti liberiga, unueco mem devas esti multflanka.

Tial, plej gravas bona fluo kaj tuja disponebleco de fidindaj kaj precizaj informoj en nia kultura komunumo. Nu, ofte oni sentas ĝenon en varbado por Esperanto, ne disponante solidajn kaj kompletajn sciojn pri tio aŭ tio: Kiom da radio-stacioj elsendas en Esperanto? Kiom da universitatoj instruas E-on? kie? je kiaj niveloj? ktp.


Eblas plibonigi nian informadon. Tiurilate mi volas substreki du rimedojn: radio-stacioj; elektronikaj reto kaj enciklopedio.

### Utilo de radioj

Hodiaŭ facilas kaj aŭskulti radio-staciojn kaj peti de ili diskonigon de informoj, danke al la faksa kaj persatelita teknologioj. Nun unuopuloj aŭ malgrandaj institucioj povas informi kaj esti informitaj rapide kaj fidinde.

La persatelitaj elsendoj de Pola Radio ĉiutage atingas siajn aŭskultantojn je tre preciza horo, per aŭdebleco bona, sendepende de la vetero, kaj sen risko de interferoj. Matene faksite, via informo jam povas esti aŭdigata posttagmeze je 15.30 en tuta Eŭropo.

Aŭskultante kaj informante Polan Radion, ni plifortigas la interplektitecon de nia kultura diasporo, kaj tiel, ĝian konsiston. Esperantujo finfine povas interne disvolviĝi kaj soci-mense



**Ricevareo de la satelito Hot Bird 1**

evolui per la sama rapideco kiel etnalingva grupo. Ĉu malrapideco ne estas nia plej grava difekto? Jen paradoksa situacio, ĉar nia lingvo en si mem estas la plej efika komunikrimedo.

Mi ja konscias ke malrapideco ebligas enprofundiĝon kaj pripensadon: tio pleje mankas al la moderna kulturmondo, superŝutita de informoj. Sed ni esperantistoj, danke al nia diasporo kaj malgrandeco, estas ankoraŭ for de tiu situacio. Tamen substrekindas ke flueco de informoj ne estas panaceo. Nura fluo povas eĉ malutili.

### Reta disponebleco

Tial ankaŭ gravas disponebleco de la informoj. Ni bezonus centran informilon konstante ĝisdatigatan. Tio povas esti nur komputila data-banko senĉese alirebla: ĉio nova kaj malnova devus esti orde kunmetita kaj fake alirebla. Nu, eĉ plej kompleta, tiu data-banko ne anstataŭos la aperadon de gazetoj kaj libroj. Sed ĝi konsistigos stabilan kaj certan referencpunkton.

Tiu ĉi dua perilo eble ŝajnas ankoraŭ tre projekta. Tamen, mi alvokas al partopreno, al sendado de informoj kaj uzado de informiloj, al densigo de la fluo tra ĉies partopreno. Ekde kiam estos sufiĉe granda trafiko de E-lingvaj informoj en la elektronikaj retoj, iu fakulo povos vivteni sin laborante por reta forumo.

Kompreneble, gravas ne nur novaj iniciatoj, sed plua utiligado de jam ekzistantaj iloj. Pro tio, kiel ĝeneralan celon kaj sintenon, mi konsideras la interplektitecon de niaj rimedoj kaj projektoj. Esperanto bezonas humilajn laborantojn kiuj dediĉas sin al valorigado kaj disvastigo de agadoj kaj ideoj de la aliaj personoj, kaj profundajn esperantojn kaj esperantistojn kiuj plezurigas sin per partopreno, legado, aŭskultado ktp. Kulturo ja konsistas el aktivado, ĝi ne estas ekzisto de varo.

En tio kuŝas nia estonteco: ĉu la esperantistaro estos sufiĉe densa kaj fidinda por plue porti sian kulturon, t.e. sian ekziston.

### Lastminute

La eŭropa raketo Ariane sukcese enĉieligis la novan sateliton de Eutelsat, Hot Bird 1 (Varmega Birdo), mardon la 28-an de marto je 23.14 UTC. Teknikaj provoj daŭros dum tri semajnoj. Se ĉio bone funkcios, multaj stacioj kiuj ĝis aprilo lokiĝis je 16° E, kuniĝos kun la aliaj je 13° E. Kiam vi legas ĉi tiujn liniojn, verŝajne tiu "plej bunta kaj kultura bukedo je 13 gradoj oriente" jam estas realaĵo.

Je 13 gradoj oriente, Eutelsat proponas 35 kanalojn, tio estas 36 televido-stacioj, inter kiuj niaj Pola Radio kaj Radio Vatikana.

Multaj kanaloj estas vaste riceveblaj (vidu mapon) per parabola anteno kun taŭga diametro: des pli granda ju pli for vi loĝas de la centro de nia mapeto.

**Bruno Masala (Francio)**



# Radioelsendoj en Esperanto Kompleta listo laŭ la stato en aprilo 1995

| Tagoj    | Tempo (UTC)  | Stacio          | Ĉefa celregiono, frekvencoj (kHz)           |
|----------|--------------|-----------------|---------------------------------------------|
| ĉiutage  | 03.30-04.00  | R. Bandeirantes | Brazilo/cetera Ameriko: 11925               |
| dimanĉe  | 04.30-04.55  | R. Aŭstrio      | Eŭropo: 6155 13730                          |
| sabate   | 05.30-06.00* | Litova Radio    | Eŭropo: 9710 (nur lastan sabaton de monato) |
| dimanĉe  | 07.00-07.30  | R. Havano       | Nord-Ameriko/Pacifiko: 6195                 |
| dimanĉe  | 10.30-10.55* | Pola R.         | nur per satelito (vd. sube)                 |
| ĉiutage  | 11.00-11.25  | R. Pekino       | Orienta Azio: 6955 9480                     |
| dimanĉe  | 11.30-11.55  | R. Aŭstrio      | Eŭropo/Afriko: 6155                         |
| ĉiutage  | 13.00-13.25  | R. Pekino       | Suda Azio: 11650 11840                      |
| ĉiutage  | 13.30-13.55* | Pola R.         | Eŭropo: 6135 7145 7285 9525                 |
| dimanĉe  | 15.00-15.30  | R. Havano       | Ameriko/Karibio: 11720                      |
| dimanĉe  | 18.30-19.00  | R. Havano       | Eŭropo/Mediterraneo: 11720                  |
| dimanĉe  | 19.20-19.29* | R. Vatikano     | Eŭropo: 527 1530 (mezondo); 4010, 5882      |
| merkrede | 19.20-19.34* | R. Vatikano     | 1611 (mezondo); 6185 7365                   |
| sabate   | 20.00-20.20  | RAI, Romo       | Eŭropo: 7275 9755 11800                     |
| ĉiutage  | 20.00-20.25  | R. Pekino       | Eŭropo: 7405 7470 9965 15370                |
| ĵaŭde    | 20.15-20.30* | Estona Radio    | Norda Eŭropo: 1035 (mezondo); 5925          |
| ĉiutage  | 20.30-20.55* | Pola R.         | Eŭropo: 6095 6135                           |
| dimanĉe  | 22.00-22.30  | R. Havano       | Eŭropo/Mediterraneo: 11720                  |
| merkrede | 22.15-22.25* | R. Sarajevo     | Eŭropo: 612 (mezondo); 7105                 |
| ĉiutage  | 22.30-22.55  | R. Pekino       | Suda Ameriko: 6955 9480                     |
| dimanĉe  | 23.30-24.00  | R. Havano       | Ameriko: 6195 9550 11760                    |

\* ekde 1995-09-24 unu UTC-horon pli malfrue

Mez-Eŭropa (Vintra) Tempo = Universala Tempo (UTC) + 1 horo

Mez-Eŭropa Somera Tempo = Universala Tempo (UTC) + 2 horoj

Nombro de Esperantaj elsendoj internaciaj en semajno: 62-63

Entuta elsendotempo en semajno: 26 horoj 28 minutoj

Elsendoj pere de satelito: *Pola Radio* (ĉiuj elsendoj): Eutelsat Hot Bird 1, 13 gradoj de la orienta longitudo, frekv. 11080 GHz, polarizado H (horizontala), aŭdofrekv.

8,28 MHz; *Radio Vatikano* (dimanĉe): Eutelsat II-F1, 13 gradoj de la orienta long., frekv. 11554 GHz (MBC), polarizado H, aŭdofrekv. 7,74 MHz

## Kelkaj lokaj radioelsendoj

- Aŭstralio:** Radio 3.ZZZ 92,3 FM (Etna Radio), P.O. Box 1106, Collingwood, Victoria 3066
- Brazilo:** Radio Rio de Janeiro, Brazila Spiritisma Federacio, Arda Passos 30, BR-20051-000 Rio de Janeiro - RJ
- Francio:** Radio Esperanto, 145 rue Amelot, FR-75011 Paris; Radio F.M.R., BP 2435, FR-31085 Toulouse CEDEX
- Hispanio:** Radio Klara, 102,6 FM, F.N. Clemente, Calixto III, 36, ES-46008 València
- Hungario:** Esperanto Radio, HU-1800 Budapest
- Italio:** Radio Radicale, Via Principe Amedeo 2, IT-00185 Roma
- Jugoslavio:** Radio Pingvin, Autoput 2, YU-11070 Beograd
- Nov-Zelando:** Access Radio, Wellington (David Ryan, P.O.B. 3867 Wellington)

*Ĉiujn informojn pri radio bonvolu sendi al la redaktoro de tiu ĉi rubriko: s-ro Josef Lechermeier, Waldeysenstr. 19/311, DE-85057 Ingolstadt, Germanio. Se eblas, bonvolu almeti reafrankon.*

## Korespondadreso kaj ĝeneralaj informoj

Radio AŬSTRIO Internacia: AT-1136 Wien (= Vieno), Aŭstrio (tel. +43/1/87878-3636; fakso +43/1/87878-3630).

Radio BANDEIRANTES: C.P. 372, BR-01059-970 São Paulo - SP, Brazilo.

ESTONA Radio: EE-200100 Tallinn, Estonio.

Radio HAVANO: Apartado 6240, La Habana, Kubo (tel./faks. +53/7/795-007). Dimanĉe trifoje al Ameriko kaj dufoje al Mediteraneo kaj Eŭropo. En Eŭropo kelkfoje bone kaptebla.

LITOVA Radio, Vilno: Radiocentras, A.D. 1792, LT-2019 Vilnius, Litovio. Lastan sabaton de ĉiu monato.

Radio PEKINO: 2 Fuxingmenwai Avenue, Beijing 100866, Popola Resp. Ĉinio. Ĉiutage 4-foje al diversaj mond-regionoj; la elsendo por Eŭropo okazas ekde la 20-a horo laŭ UTC.

POLA Radio, Varsovio: Skrytka pocztowa 46, PL-00950 Warszawa, Pollando (tel. +48/22/459-358, 459-337; fakso 444-123). Disaŭdigas ĉiutage 2 programojn, ĉefe por eŭropaj aŭskultantoj.

RADIOTELEVISIONE ITALIANA (RAI): C.P. 320, IT-00100 Roma, Italio. Sabate 20-minuta programo por Eŭropo.


Radio SARAJEVO: fakso +387/71/455-141. Korespondaĵoj al Internacia Kultura Servo, Amruševa 5, pk. 499, HR-41000 Zagreb, Kroatio.

Radio VATIKANO: IT-00120 Città del Vaticano (fakso +39/6/698-38-44). Dufoje semajne por aŭskultantoj en Eŭropo kaj en la Proksima Oriento.

## Aŭskultu la voĉon de Sarajevo

*Esperanto el Sarajevo:* 16 elsendoj de Radio Sarajevo en Esperanto, inter aŭgusto 1994 kaj januaro 1995. 2 x 60 min. 30,00 gld.





## La vojo al la lernejoj



Mi vokas ĉiun ageman samideanon fondi societon por la kompletigo de nia ĝisnuna agado per kunlaboro celanta la disvastigon de la rondo de Esperanto-paro-

lantoj en la mondo, per efikaj rimedoj.

La fina celo de nia agado estos atingi ke Esperanton oni eklernu en la lernejoj en la tuta mondo. La vojo al tiu ĉi celo kondukas tra la lernejo; al ĉi tiu, siavice, tra la konvinko de la vasta publiko pri la avantaĝoj de la lerno de la IL. El tio ĉi sekvas ke solvi la taskon la instruistoj (la plej koncernataj) mem ne kapablos, en ĝian realigon ni devos entiri ankaŭ la neinstruistajn gesanojn — la fondo kaj funkcio de tiu ĉi societo (ni ĝin nomu Societo por Preparo de Lerno de Esperanto en Lernejoj: SPLEL) celas ĝuste la solvon de tiu ĉi tasko.

Niaj ĝisnunaj propagandaj manieroj estis ne tre efikaj, ĉar ili baziĝis sur ete nebulaj kaj malplenaj argumentoj, kaj ne sur la motivoj veraj por eklerni iun fremdan lingvon. Lerni Esperanton, kiel ankaŭ la ceterajn lingvojn, oni volas unuavice por ĝin uzi en la ĉiutaga vivo, precipe en la turismo (por preni nur la plej ĝeneralan motivaĵon), kaj ne

nur por babili inter samlandanoj. Ankaŭ Esperanton, kiel lernotan lernejan fremdan lingvon, oni memvole elektos nur se oni spertos ĝian certagradan uzeblecon tie. Sekve, ni kreas uz-eblojn unuavice surkampe de la turismo. Konkrete, tio ĉi signifas ke ni konvinkos dungitojn de turismaj objektoj pri la neceseco de scio kaj uzo de Esperanto, kaj eventuale ni ankaŭ instruos la lingvon al ili. Temas pri dungitoj de la publika transporto, muzeoj, vendejoj, vojaĝburooj, polico ktp. La realigo okazos internacie kaj samtempe, sed pri gajno de ĉiuj dungitoj memkompreneble ne temas. Pri la realigo de siaj taskoj ĉiu kunlaboranto respondecos laŭnome.

La realigo de la projekto okazos en du etapoj. En la unua agos ni mem: tiu ĉi periodo daŭros ĉ. unu jaron kaj finiĝos per ekzameno de la koncernaj lernintoj. Kaze de sukcesa ekzameno ili ricevos etiketon kun la teksto "Esperanto parolata", kiun ili fiksos al la pordo de sia laborloko por indiki la scipovon de Esperanto. Dum tiu ĉi periodo komenciĝos la faka klerigo de la E-instruistoj (en formo determinota pli malfrue) kaj ankaŭ la preparo de video-filmo por instrui nian lingvon.

Dum la dua ŝtupo la televidaj studioj helpos nian laboron per la projekcio de niaj lingvokursaj filmoj. Por la persvado de televidistoj servos unuavice niaj atingajoj dum la unua etapo. Dum la dua etapo ni preparos la helpilojn por la ekinstruo de la lingvo, ni provos atingi la apogon de la koncernaj ministerioj, kaj plu daŭros la preparo de la instruistoj.

Nia sukcesa laboro ebligos kaj la amasan ekinstruon de Esperanto en lernejoj, kaj la aplikon de Esperanto sur aliaj kampoj, kiel: en la televido, kiel la lingvon de surekranaj subtitoloj, aŭ kiel la lingvon de uz-avizoj de varoj.

Aliĝojn mi petas al la adreso:

**János Petik**

Szontágh P. u. 9/7

HU-2660 Balassagyarmat, Hungario

## La ozontruo estas kulturtruo



Lastatempe en *Esperanto* (nov. '94, p. 196) vekigis diskuto pri kulturo kaj pseŭda kulturo. Jen kelkaj koncernaj notoj.

La daŭra diskuto pri pseŭda

kulturo en la mondo, aparte en kaj de Usono, estas malfeliĉiga. Ĝi elmontras kelkajn aspektojn de la koncernataj intelektuloj-esperantistoj, kiuj absolute relativigas la esencon de ties kritiko.


Se temas pri kreado, utiligado kaj taksado de kulturo, la subjektiva faktoro ja absolute evidentas kaj gravas. Kiu volas kaj povas arogi al si la rajton difini ion kulturo kaj ion alian pseŭda kulturo? Ĉu la produktoj de Frank Zappa aŭ de Tom Petty estas malpli da kulturo ol tiuj de El-ultimo-de-la-fila aŭ de Kajto? Kio pri Cage aŭ Bukowski — ĉu pseŭdokulturistoj kontraste al Stockhausen aŭ Cela? Kaj eĉ alia aspekto: Kio pri la kulturo en la metioj de la homaro? Ĉu ekz. la vinfarado en la Napa- kaj Barossa-valoj estas pseŭda kontraste al tiu en Héroult aŭ ĉe Rejno? Ktp.

En la diskuto denove evidentiĝas la sufiĉe mallarĝa bazo de la ĝisdata oficiala esperantisma idento. Ties reduktiĝo al fakte eksklude lingvo-kulturaj fenomenoj estas en si mem pseŭdokultura, kaj lastinstance ankaŭ tre malhelpa koncerne la propran evoluon.

La disvastigo de ajna kulturo, ĉu aŭtentika ĉu "pseŭda", okazas laŭ la samaj kriterioj kiel la disvastigo de aliaj varoj. Kulturo en tio fakte funkcias laŭ la reguloj de la libera merkato, tutmonde. Kaj sole la fakto ke la pseŭdaj kulturajoj, laŭ "absolutaj" kriterioj pli malvaloraj, estas mondvaste pli facile akceptataj kaj vendeblaj, klarigas la lingvan kaj kulturan submetiĝon, eĉ submetiĝemon, de la ekonomie ne tiom fortaj regionoj de la mondo.

Jen la decida punkto: Same kiel la tuta monda merkato fariĝis tro granda kaj disipema, tiel ankaŭ la kultura merkato. La sekvoj estas konataj. La ozontruo estas kulturtruo, kaj en tiu

Baza gvidilo por instruantoj de la internacia lingvo:



**metodiko de la esperanto-instruado**

de Rudolf Rakuša (1893-1970)

Tri eldono de la verko aperinta en 1957 kaj kompletigita en 1970. 189p. 20cm. 15,00 gld. Triona rabato ekde tri ekzempleroj.



oni ĉefe parolas la anglan. Ne pro la superaj kulturaj kvalitoj, sed pli ĝuste pro la superaj ekonomiaj kaj infra-strukturaj ebloj kaj povoj.

Necesas tutmonde nova listo de prioritatoj laŭ ĉefe ekologiaj kriterioj. Kaj en tiu listo oni devas inkludi ankaŭ la konsumemon koncerne kulturajn. Mondturneoj de tutaj teatroj kaj operaj trupoj, samkiel trejniĝ-periodoj de nordeŭropaj futbalteamoj en Arabio kaj similaĵoj, estas “kulture” groteskaj. Kaj estas vere kultura laboro minimumigi tiajn “pseŭdo”-kulturajn sensencaĵojn. Por la socio ĝenerale estus pli bone unue ordigi la esencajn necesojn, bezonojn kaj normojn, kaj agadi laŭ tiuj, ol atendi katastrofojn, kiuj je pli altaj kostoj finfine eldeigas la saman novan ordigon.

Kian rolon povas ludi Esperanto en tiu koncepto? Unue la esperantismo, kiel ĝi konkretiĝas forme de la oficialaj Esperantaj instancoj kaj asocioj, devas identigi ankaŭ ekologie, same kiel ĝi identigiĝas pace kaj homrajte. Internacia lingvo, tute sendepende de sia lingva esenco, estas unuagrada, ĉar imanenta, porviva preventilo:

- Laŭkvalite, ĉar ĝi reduktas interetnan informadon-komunikadon je minimumo koncerne egoismojn, sen perdo de mem-identoj — imanente plenumante la postulon de konkreta neŭtraleco.
- Laŭkvante, ĉar ĝi reduktas perlingvan informadon-komunikadon je ĝia esenca minimumo sen perdo de kompetento — imanente plenumante la postulon de konkreta materiala ŝparemo.

Akiro kaj scipovo de ILo estas do kvazaŭ socikultura vakcinado. Laŭkvalite ĝi preventas la malsanon de perforto kontraŭ samestanoj kaj kontraŭ la vivo ĝenerale; laŭkvante ĝi estas la plej maldisipema kaj plej prezinda metodo ĉi-cele.

Post la fino de la malvarma milito la esperantismo perdis terenon. Ĉiuj novaj politikaj konceptoj de praktika signifo fakte ne inkludas Esperanton. Kaj sen decida noosfera (t.e. politika-kultura-biosfera) idento la esperantismo ne povas oferti ion novan, vere akceptindan, al la politikaj strukturoj de la venonta jarmilo. La prinotenda kaj malakrigenda konflikto ne estas tiu inter aŭtentika kaj pseŭda kulturoj, sed tiu inter socio- kaj vivo-detrua resp. daŭripova evoluoj de la homaj socioj.

Wolfgang Gunther (Germanio)

# Reagoj

## “Komo ebligas pli klaran komprenon” (PIV)

El nia letero citita en februaro (“Ĉu meti aŭ ne meti?”, p. 28) ial malaperis kelkaj ekzemploj, per kiuj *Plena Analiza Gramatiko* evidente pravigas la Zamenhofan interpunkcion de ni defendatan. Nome: “mi vidis, ke li venas”; “diru, kiam vi estos preta”; “mi ne scias, ĉu tio estos oportuna”; “li ne venis, ĉar li estas malsana”. Similaj frazoj, kun la respektiva aplikado de komoj antaŭ *ke*, *kiam*, *ĉu* kaj *ĉar*, ja abundas en la oficiala Fundamento de Esperanto, lingvobaza kodo ekskluzive gvida por ĉiuj ge-esperantistoj senescepte!

La redakcio argumentas, ke: “Ĉar la interpunkciaj kutimoj de niaj aŭtoroj estas tre malsimilaj, ni bezonas iom unuecigi iliajn tekstojn el tiu vidpunkto.” Jes, oni devas unuecigi ĉiujn tekstojn, sed nepre surbaze de la interpunkcia vidpunkto de D-ro Zamenhof, eksplicite reflektata kaj en lia obeenda Fundamento, kaj en lia tuta verkaro.

Sekve, agi laŭ apartaj kriterioj, tio fakte signifus malunuecigi, kaosiĝi nian legohelpan interpunkcion, jam de pli ol cent jaroj daŭre uzatan de la plej kompetentaj E-verkistoj tutamondaj.

Ramón Manau Torres kaj Vincento Hernández Llusera (Katalunio)

## Ne tuŝas la esencon

Centprocente konsentite al via starpunkto pri la interpunkcio, inkluzive pri la determina (restrikta) kaj nedetermina subpropozicioj.

Restas problemo ĉu ĝi ne konfliktas kun la Fundamento. Mi opinias ke la zamenhofa interpunkcio en la Fundamento ne konsistigas fundamentecon. Tiu opinio estas arbitra, sed oni montras multe pli grandan arbitrecon pri la Fundamento, kaj ĉi tia libera interpreto ne tuŝas la esencon. Mi pensas ke Zamenhof nur sekvis la kutimon de la orient-eŭropa germana kultursfero.



Antaŭ ĉio, ĉiuj eminentaj stilistoj de nia lingvo (inkluzive de germanoj) ne observas la zamenhofan interpunkcion, krom malmultaj esceptoj kiel Waringhien.

YAMASAKI Seikō (Japanio)

## Atenco al la Zamenhofa lingvo

Kvankam mi ne estas fanatika *fundamentisto*, lastatempe frazoj de nia organo fulme batas miajn okulojn, pro la enkondukita interpunkcia sistemo. Tio al mi ŝajnas eĉ unu atenco kontraŭ la Zamenhofa lingvo.

Usui Ryō (Japanio)

## Sen atenca tuŝo

Feliĉe vastiĝas la kutimo uzadi la komojn laŭ maniero pli nuancita ol tiu kiu estis uzata de Zamenhof kaj konstatita de *Plena Analiza Gramatiko*. Tio ja povas nur utili al la esprimivo kaj nuancivo de Esperanto, krome sen minimuma atenca tuŝo al io ajn.

Antonio Alonso Núñez (Hispanio)

*Red.:* Anstataŭ redaktora komento, jen pripensinda frazo de s-ro Hernández Llusera: “La ‘komo-afero’ povus esti pli aŭtoritate traktata, ne nur de kelkaj kompetentaj ge-interesatoj pri la temo, sed ankaŭ de la gemembroj de la Akademio de Esperanto, kiu ja havas la devon respektigi kaj unuecigi la lingvon.”

## Nek la celo nek la rimedo

Laŭ F. de Diego “futura laboro por la Akademio povus esti la unuformigo de [nacilingvaj-Esperantaj] vortaroj rilate al [...] neologismoj” (apr., p. 62). Tamen li mem konstatas ke “se Esperanto ne funkcius kiel la naciaj lingvoj, niaj ŝancoj de supervivado nehelveble reduktiĝus”. Nu, kiun vivantan nacian lingvon oni klopodas evoluigi (reformi) pere de ĝiaj fremdlingvaj vortaroj?

Do oni povas malkonsenti ne nur pri lia celo (plisimiligi Esperanton al okcident-eŭropaj lingvoj), sed ankaŭ pri lia rimedo.

Edmund Grimley Evans (Britio)





Lot. II.N. 54 bis, Analamahitsy, MG-101 Antananarivo.

## • Ĉinio-Koreio: Ĝemeliĝo

La prezidantoj de la E-asocio de Qingdao (Ĉinio) resp. tiu de Taegu (Koreio) subskribis kontrakton pri ĝemeliĝo de la du asocioj la 2-an de januaro, en Qingdao. (*El Popola Ĉinio*)

## • Francio: Senpage informado

Robert Llorens (Les Hortensias 2, 121 bis, Bd Napoléon III, FR-06200 Nice, Francio) eldonas trimonatan franclingvan informilon por neesperantistoj, *ESPERANTO-INFO*. Li dissendas ĝin senpage al lernejoj, bibliotekoj ktp. Specimeno kostas 7 frankojn, jarabono min. 20 frankojn (UEA-konto "roll-s").

## • Italio-Tampere-Italio

Jen la itinero de "Universala Buso", kiu startos en julio el Triesto, celos la okazejojn de diversaj E-aranĝoj (SAT-kongreso en Slovenio, literatura forumo en Gdańsk ktp.), atingos Tampereon por la UK, kaj revenos al Triesto laŭ malsama vojo. Eblas aliĝi por kiu ajn voj-parto (kaj eĉ influi la itineron) ĉe Višnja Branković (Via Leghissa 6, IT-34131 Trieste, Italio), kiu zorgos pri survoja prezentado de novaj E-eldonaĵoj, kaj celas enbusigi E-aktivulojn, verkistojn, kantistojn, aktorojn ktp.

## • Katalunio: Klerecreĝino

En unuhora televid-programo pri lingvoj de la Barcelona kanalo TV-2, satellite kovranta parton de Eŭropo kaj de Sud-Ameriko, pri Esperanto parolis Llibert Puig, ĝenerala sekretario de Kataluna E-Asocio, kaj la gejunuloj Pere Bernús kaj Rina Amerio.

Kultura Asocio E-ista proklamis, la 26-an de feb., la 21-jaran e-istinin Noemí Gilabert Casassas "Klerecreĝino Esperanto 1995".

## • Kubo: Eksterlandanoj bonvenaj

La 12-a komitat-kunsido de Kuba E-Asocio, kunveninta en la provinco Camagüey (28-29 jan.), difinis la daton de la dua nacia kongreso de KEA je

7-9 marto 1996. La financa stato de KEA (Ap. 5120, CU-10500 La Habana) multe dependas de eksterlandaj vizitantoj. Malgraŭ la ekonomia krizo, la e-istoj lastatempe etendis sian agadon al 11 el la 14 kubaj provincoj. En 1995 aperos tri numeroj de la asocia organo *Avanco*. (M. Gutiérrez)

## • Madagaskaro: Universitata kurso



La dekanato de la beletra fakultato de Universitato Antananarivo decidis startigi E-kurson en majo. Konvinkis lin Désiré Rabevazaha (sur la foto), ĉe kiu bonvenas

subteno kaj helpo: B.P. 3171, Antananarivo-101.

En la komerca kaj teknika altlernejo EPCT Esperanto estas devige instruata ĉiusabate de Roger Rasolofo. Skribu kuraĝige al: EPCT - Esperanto-kurso,

## • Mongolio: Varb-valora vojaĝo

La vojaĝo de Ĉimidiyn Dogsuren al la Seula UK kaj al Japanio kadre de la azia karavano (vd. apr., p. 67) vekis intereson ĉe mongolaj gejunuloj pri Esperanto. Ĉe la Universitato de Mongolaj Scioj en Ulanbatoro Vladimir Minin instruis 16 komencantojn dum unu monato. En decembro fondiĝis tie la E-klubo La Stelo, kaj 60 gestudentoj kursas je du niveloj. (*Esperanto en Azio*, V. Minin)

## • Togolando: Tutmonda tendaro

Gejunuloj de la tuta mondo estas invitataj en julio al rearbariga tendaro en Noĉe (Togolando) kaj internacia ekskurso tra Togolando, Ganao kaj Benino. Aliĝiloj kontraŭ 1 internacia respondkupono ĉe AFANTCHAO-BIAKOU Yao, BP 20225 Lomé, Togolando.

## • Usono: Urbestraj proklamoj

Por marki la Internacian Semajnon de Amikeco (19-25 feb.), la urbestroj de Ĉikago, Illinois kaj Harlingen (Teksaso) eldonis oficialajn proklamojn. Urbestro H.W. Card (Harlingen) notis ke "E-o antaŭenigas tutmondan amikecon per la uzo de vortoj komunaj en eŭropaj lingvoj, speciale en la hispana, vaste parolata en niaj ĉelimaj komunumoj". (*ELNA Update*)



## • Zimbabvo: Asocio aprobata

En Zimbabvo UEA havas nur unu membron, la Cseh-instruiston Oliver Mazodze. Tamen ekzistas E-asocio en la lando: Zimbabva E-Instituto (P.O.B. 1283, Masvingo), kiu ricevis aprobon de la ministerio eduka kaj kultura en pasinta novembro. Nun 30 personoj lernas per ses-leciona korespondanta kurso de Mazodze. (Sur la foto: membroj de ZEI; Mazodze kun kravato.)



# Fake



## • Filatelo: Bildkarta rondo

Saija Talvala (It. Linjapuisto 11 A 5, FI-45700 Kuusankoski, Finnlando) gvidas Amikan Rondon de Bildkart-kolektantoj, kiu helpas trovi partnerojn por interŝanĝo.

La ekspozicio "Esperanto kaj la mondo" prezentis en Svitavy (Ĉeĥio, 1 marto - 16 apr.) pli ol 300 divers-tajn E-poŝtkartojn.

## • Homaj rajtoj: Infan-ekspluato

Childright Worldwide ("Mondmovo por Infanaj Rajtoj", Vondelstraat 120, NL-1054 GS Amsterdam), fondita de la nederlanda Nobel-premiito kaj E-simpatianto Jan Tinbergen, batalas kontraŭ ĉiuj formoj de infan-ekspluato. Eksciuj pli de Jacques Tuinder, Henegouwenlaan 35, 1966 RH Heemskerk, Nederlando.

## • Infanoj: FERI' en Okcidento

Laŭ Ilja De Coster (Varendrieskouter 47, BE-9031 Drongen-Gent, Belgio) mankas e-istaj infan-renkontigoj en Okcidenta Eŭropo. Tial li atendas helpon de ĉiuj spertuloj pri infana agado, por organizi Festan E-Renkontiĝon Infanan. (*Saluton!*)

## • Informado:

### Vidbendo jes, televido ne

Aĉeteblas aŭ prunteblas ĉe E-Junularo Bonn (Pf. 29, DE-53019 Bonn, Germanio) 40-minuta vidbendo germanlingva, reklamcele kompilita el lastatempaj video-registraĵoj pri junularaj aranĝoj. (*GEJ-Gazeto*)

El 2500 projektoj submetitaj al la nova kultura televid-kanalo Canal 5 en Francio, la projekto de priesperanta filmo (vd. apr. 1994, p. 66) ne estis akceptita. (*JeunEsperanto*)

Willem Verloren van Themaat statistikis 155 erojn pri E-o en la nederlandaj amaskomunikiloj en 1994 — malkresko kompare al 176 eroj en 1993.

En la anglalingva komerca magazino Euro-Holland Trade aperis en marto 3-paĝa, riĉe ilustrita prezento de Esperanto, bazita sur intervjuo kun Simo Milojević.

## • Instruado: Al instruistoj kaj studentoj

Renato Corsetti, Umberto Broccatelli kaj Mauro La Torre (Roma Esperanto-Centro L. Minnaja) prizorgis pasintjare en L'Aquila kurson, al kiu aliĝis kvindek da instruistoj. Ĉi-jare s-ino Di Donato gvidas kurson por dek ses instruistinoj de elementa lernejo en Civitavecchia, kadre de ĝisdatigaj porinstruistaj kursoj. (M. Lipari)

Du pagataj kursoj prosperas en Japanio, ambaŭ je du niveloj: ĉe Universitato Waseda instruas WADA Seiiti kaj KIKUSIMA Kazuko, ĉe la lingvistika eldonejo Daigaku Syorin — KITAGAWA Hisasi. (*La Revuo Orienta*)

En Nederlando la eduk-ministerio rekonis la Fondaĵon "Esperanto ĉe la Instruado" kiel instancon kompetentan por trejni E-instruistojn mezlernejajn.

Ralph A. Lewin komencis en aprilo kurson en Universitato California (San Diego) por dudeko da studentoj.



**Grupo Zamenhof (vd. "Muziko").**  
Ilia T-ĉemizo mesaĝas: "Surmetu vian kondomon, kamarado!"

## • Interlingvistiko: Premio en Germanio

Vasta publiko povis konatiĝi kun la fenomeno "funkcianta planlingvo" en la 17-a Konferenco de la Germana Societo pri Lingvistiko (1-3 marto, Göttingen), kie unufoje surprogramis ĉi-tema laborgrupo. Prelegis Otto Back, Detlev Blanke, Till Dahlenburg,

Aleksandr Duliĉenko, Michel Duc Goninaz, Heiner Eichner, Sabine Fiedler, Ilona Koutny, Barbara Lenz, Alicja Sakaguchi, Klaus Schubert kaj Ernst F. Sondermann. Sakaguchi, kiu iniciatis la laborgrupon, klopodas eldoni la prelegojn en prestiĝa serio lingvistika.

## • Lingvopolitiko: Silentemaj kandidatoj

Henri Masson, ĝenerala sekretario de SAT-Amikaro, sendis en februaro leteron al naŭ prezidentaj kandidatoj en Francio, demandante pri ilia starpunkto rilate lingvopolitikon kaj Esperanton. Ĝis la 25-a de marto respondis nur Édouard Balladur (dekstro), Lionel Jospin (socialistoj) kaj Dominique Voynet (verduloj). Nur la verduloj "ĝenerale favoras" la proponojn de SAT-Amikaro (ili kunsendis du siajn dokumentojn pri resp. en Esperanto); la aliaj evitis konkretaĵojn. (SAT-Amikaro)

## • Literaturo: Tradukologio en Varsovio

En pola-hungara konferenco pri traduk-teoriaj problemoj kaj pri tradukado inter malpli ofte uzataj lingvoj, ĉe la Hungara Kultur-Instituto en Varsovio (22-23 feb.), Wojciech Usakiewicz prelegis pri Kalocsay, *Literatura Mondo*, kaj la formiĝado de literatura lingvaĵo en Esperanto.

## Muzeo: Fermita pordo en Vieno

Internacia Esperanto-Muzeo en Vieno estos fermita ĝis julio, pro konstrulaboroj postulataj de la fajropolico. Oni ankoraŭ memoras la incendion kiu damaĝis en 1992 la konstruaĵon (Hofburg) kie situas la muzeo.

## Muziko: Zamenhof pri aidoso

Ĉi tiu juna Brusela duopo de rep\*-kantistoj (maldekstre) nomiĝas Zamenhof kaj batalas per sia muziko kontraŭ aidoso. (G. Kamaĉo)

## • Politiko: IKEL protestis

Daniele Vitali, vicprezidanto de Internacia Komitato por Etnaj Liberecoj, sendis la 17-an de januaro leteron al la rusa prezidento Boris Jelcin, por protesti kontraŭ "la agreso kaj amasmortigado en Noĥcio" (*noĥ-ĉoj* estas la nomo kiun uzas pri si la popolo nomata ruse *ĉeĉenoj*).

\**repo*: sinkopa muzikstilo, karakterizita de rapida ritma parolado



## Skoltismo: Invito al Bulgario

Ĥristo Mandev (bul. Mogilev 2 II 19, BG-5306 Gabrovo, Bulgario), nacia reprezentanto de Skolta E-Ligo, fondis en sia urbo skoltan turisman klubon, kies anoj ŝatus korespondi Esperante kaj invitas al dusemajna aŭgusta marŝado en la montaro Pirin.

## • Sporto: Pli longa ol maratono

Esperanto estas instruata devige en kvar klasoj de la Gimnazio Thury György (Esperanto-grupo, Várpalota, Szent Imre u. 9, HU-8100 Hungario). Laŭ ideo de la 16-jara sportisto Máté Baranyai, gelernantoj de la gimnazio planas ĉirkaŭkuri la grandan lagon Balatono la 17-an de majo. Bonvenas kuraĝigoj aŭ gratuloj.

## • Ŝako: Ĉu EŝLI en pato?

Esperanta Ŝak-Ligo Internacia (EŝLI) nombris en 1985 ĉ. 400 membrojn — sed nur 170 en 1995. Jaromír Canibal, estrarano de EŝLI kaj redaktoro de ties *Esperanta Ŝako*, konstatas ke tute mankas nun EŝLI-membroj ekz. en Bulgario, Hungario kaj eks-Jugoslavio.

## • Teatro: Skiza surscenigo

Organizate de Paul Gubbins, duafoje okazis semajnfino “Ni teatrumu” en Barlaston (Britio, 24-26 feb.). Oni rollegis *Kia miksaĵo!* de F.V. Dorno, *Ĵonglistoj* de Belinus, kaj teatraĵon de Karolino Gilmöre. Du pecojn de Gubbins, premiitajn en Belartaj Konkursoj, la teatrumantoj zorge studis kaj skize enscenigis. Stephen Thompson instruis pri teknikaj aspektoj de profesia aktorado. (K. Halo)

## • Turismo: 770 eldonaĵoj


Ĝisdata katalogo de Constant Borremans (Niedersachsenweg 9 b, DE-21244 Buchholz, Germanio) listigas 770 turismajn eldonaĵojn el 45 landoj en Esperanto aŭ kun E-traduko. Li sendas la liston kontraŭ 2 germanaj markoj aŭ kontraŭ ĉiu ajn turismaĵo kun E-teksto.

## • Universitatoj:

### Lastfoje en Hartford?

“1995 estos la lasta jaro de la someraj kursoj en Hartford, se ni ne trovos pli da studentoj” — avertas David Wolff en la usona bulteno *Verda Lumo*. Ekde la starto en 1991, jam 81 homoj studis en la E-kursoj de Universitato Hartford, kiuj ĉi-jare okazos inter la 10-a kaj 15-a de julio (Hilda Grossman, 200 Bloomfield Ave., West Hartford, CT 06117).

# Anoncetoj



Serĉas turismajn kontaktojn kun ĉiuj landoj; proponas akvo- kaj gas-tubojn de metalurgia uzino, sportajn aviadilojn: Gennadij S. Mitrofanov, p.k. 36, RU-347924 Taganrog-24 Ros-tovskoj obl., Rusio.

Pasintas 10 jaroj de la morto en Bukareŝto de esperantisto Saul Osias. Nun en Rumanio aperis la libro *Esperanto* de Saul Osias, kun vortaro.

*Verda Reto 1995 — listo de ĉinaj e-istoj aktivaj kaj interkontaktemaj* estos dulingva libro kiu supleme-nte konigos internaciajn organizojn kaj gazetojn per- aŭ por-Esperantajn. Interesatoj sendu sian prezenton en

malpli ol 100 vortoj al la kompilanto Liu Xiaozhe (32 North Youhao Road, CN-830000 Urumqi, Ĉinio; faks. +86/991/484-15-46).

Oni defis la esperantistaron kaj mi akceptis la defion. Por gajni ĝin *nur vi* povas helpi. Mi bezonas donaci al biblioteko de loka lernejo cent Bibliojn en diversaj lingvoj. Ĉu vi sendos al mi unu ekzempleron? Rekompence mi sendos al vi bonan libron, *Bazoj por via konduto*, kaj poŝan kalendaron en Esperanto. Sendu la Biblion al Paulo Amorim Cardoso, delegito de UEA, Poŝtkesto 12162, BR-60021-970 Fortaleza - Ceará, Brazilo.

## OFICIALA INFORMILO

### NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ

Britio: Geoffrey Greatrex. Italio: Marco Monteggia. Japanio: Etsuo Miyosi. Slovackio: Jozef Reinvart. Usono: Corey A. Brill.

### NOVJORKA OFICEJO DE UEA

SUBTENANTOJ (minimumo \$25): Finnlando: Hemmo Tietti. Meksiko: Julie L. Regal.

### PATRONOJ DE TEJO

Francio: Pierre Lelièvre; Hervé Mougin; Paul Samain. Israelo: Jehoŝua Tilleman. Italio: Giampiero Martini. Japanio: Joel Brozovsky; Ikuko Yazima-Kitagawa. Kanado: Stevens T. Norvell Jr. Sume por 1995 ĝis nun 84 Patronoj.

### SOCIETO ZAMENHOF

Finnlando: Jukka Laaksonen. Francio: Maurice Feneyrol. Germanio: Josef Suermann. Hispanio: Josep Castellort i Riba; Josep Franquesa Solé. Italio: Catina Giulia Dazzini; Giampiero Martini. Japanio: Klivo Lendon; Kōiti Simizu. Kanado: Bruce R. Crisp; Marijke Meijer; Stevens T. Norvell Jr. Meksiko: Julie L. Regal. Nederlando: Ru H. Bossong. Norvegio: Margrete Landmark; Olav Reiersøl. Ukrainio: Evgenij Kovtonjuk. Sume por 1995 ĝis nun 240 SZ-anoj.

### DONACOJ (gld.)

ĝis la 31-a de marto

Fondaĵo Afriko: Italio: D. Trombetta 1912,20. Kanado: L. Smith 35,40; J. Warren 35,97. Meksiko: J.L. Regal 31,71. Svedio: J. Setréus 48,29. Sumo ĉi-jara 3216,67.

Fondaĵo Ameriko: Anonime: 100,00. Meksiko: J.L. Regal 31,71. Svedio: J. Setréus 48,29. Sumo ĉi-jara 661,33.

Belarta Fondaĵo: Kanado: M. Payne 11,80. Fondaĵo Canuto: Finnlando: H. Tietti 100,00. Germanio: C. Darbellay 19,03; P.W. Ruff 60,00. Japanio: M. Aihara 34,71; H. Inumaru 52,06; A. Itagaki 33,99; E. Kimura 34,71; S. Kitagawa 33,99; Y. Misawa 104,13; H. Mitu 34,71; R. Morita 34,71; T. Nisikawa 84,98; S. Oonisi 33,99; E.R. Sikoku 34,71; Z. Suzuoki 169,95; T. Tanabe 69,42; K. Tutiya 34,71; Esp. Rondo de Kakegawa 34,71. Kanado: P. Hansen 15,34. Meksiko: J.L. Regal 31,71. Nederlando: M. van Oostendorp 23,00; Konversacia E-Rondo Nijmegen 307,25. Slovenio: J. Židanik 250,00. Tajlando: F. Andreoni 60,22. Diversaj malgrandaj 8,26. Sumo ĉi-jara 3670,45.

Generala Kaso: Britio: W.H. Hawkins 22,19. Francio: R. Lemaire 314,38. Israelo: J. Giladi 50,00. Japanio: H. Nagata 11,98. Kanado: O. du Temple 10,61. Slovenio: J. Židanik 250,00. Diversaj malgrandaj 17,74. Sumo ĉi-jara 2628,27.

Fondaĵo Grabowski (en usonaj dolaroj): Kanado: J. Schipper 23,60.

Konto Espero: Kanado: M. McCall 15,26. Sumo ĉi-jara 943,00.

Fondaĵo Oficeja Ilaro: Kanado: U.P. Ronald 21,80. Sumo ĉi-jara 71,80.

Propaganda Konto: Diversaj malgrandaj 9,44. Sumo ĉi-jara 1009,44.

Triamonda Kongresa Fondaĵo: Britio: A. Vincent-Jones 20,00. Finnlando: H. Tietti 352,80. Meksiko: J.L. Regal 31,71. Sumo ĉi-jara 751,51.

Volontula Fondaĵo: Britio: A. Vincent-Jones 20,00. Japanio: T. Kawai 15,00. Sumo ĉi-jara 149,00.

Al ĉiuj tre koran dankon!

UEA



Jaán Ojalo:

## esperantaj sinonimoj <sup>NOVAJO</sup>

La plej kompleta de sia speco; bazita sur Plena Ilustrita Vortaro. La unua parto donas sinonimojn por ĉ. 2000 vortoj. La dua parto estas indekso, kiu ebligas trovi sinonimojn por 5500 vortoj. Tre utila por pliriĉigi la vortotrezoron kaj freŝigi la stilon.

Dua korektita eldono, 1993. 96p. Prezo: 15 guldenoj. Triona rabato ekde tri ekzempleroj.

Sanigas nekuraceblajn malsanojn, bonigas farton, donas energion, natura kaj facile lernebla

## YUMEIHO-TERAPIO

Orienta Speciala Diina Masaĝo

Koksoston Ĝustiga Premkneda Terapio  
de profesia terapiisto Masayuki Saionji.

Dua eldono, reviziita kaj grandigita, riĉe ilustrita.  
Prezo 21,00 gld. (rabato 33% por min. 3 ekz.).

Mendebla ĉe la Libroservo de UEA.

Videobendon en diversaj sistemoj (en Esperanto kaj aliaj lingvoj) mendu por 80 gld. ĉe:

**Internacia Instituto de Preventa Medicina Praktiko,**  
CPO Box 405, Tokyo, 100-91, Japanujo.

## La plej granda en la mondo!



## LIBROSERVO DE UEA

Stokas ĉiun haveblan Esperanto-libron •  
Rabatas ekde tri ekzempleroj • Sendokostoj  
nur 10% • Rapida servo • Katalogo 9,00 gld.

Alphonse Daudet:

## Tre mirigaj aventuroj de TARTARIN DE TARASKONO

La Libroservo de UEA ankoraŭ havas  
kvanton de tiu ĉi humura majstroverko!

192 p., tole bind., ilustr. 18 gld., triona rabato ekde 3 ekz.



Ankaŭ vi povas kontribui!

## Fondaĵo Ameriko



helpas al la Esperanto-movado en Centra kaj Suda Ameriko. Vian donacon vi povas sendi pere de la kotizperanto en via lando aŭ rekte al UEA. Dankon!

## 2-A ELDONO

MARJORIE BOULTON



"Unika legolibro,  
plej bonveniginda  
kaj rekomendinda  
al ĉiuj studentoj  
de la Internacia  
Lingvo."

Baldur Ragnarsson

Fabeloj, mirindaĵoj kaj internaciaj  
rakontoj sur pli ol 400 paĝoj . . .

Rotterdam: UEA, 1993 (dua korektita eld.). 431p. 21cm.  
Prezo: 36,00 gld. Triona rabato ekde tri ekzempleroj.

"Se ekzistus en la realo la lando Esperantujo,  
jen unu el la tekstoj, kiujn oni certe legus  
en ĉiuj mezgradaj lernejoj."

RENATO CORSETTI



La nova 18-a eldono, prinotita de prof. G. Waringhien, faras maksimumajn klopodojn tekste reiri al la 1-a eldono de 1903, sed grafike resti ĉe la bela 17-a eldono de 1954.

18 + 446 paĝoj. Tole bindita kun legrubando kaj kromkovrilo. Prezo: 48,00 guldenoj (32,00 gld. ekde 3 ekzempleroj).

Mendu ĉe la Libroservo de UEA!





## 2<sup>a</sup> ESPERANTO EŬROP-UNIA KONGRESO

PARIZO  
MONTROUGE

2<sup>a</sup>/6<sup>a</sup> JUNIO 1995

el la programo: ĉeftemo: NIA EŬROPO  
teatraj kaj varieteaj eventoj – bankedo –  
balo – festparolado de C. Piron –  
prelego de G. C. Fighiera – ekspozicioj –  
libroservo – urbovizitoj – kunveno de  
EŬROPA ESPERANTO-UNIO

Konstanta adreso: 4 bis rue de la Cerisaie, 75004 Paris

### Verkoj kiuj koncize kaj klare enkondukas al Islamo

Elektitaj versoj el la Sankta Korano. El la araba tradukis Italo Chiussi. 1988. 124p. 21cm. Versoj zorge, laŭteme elektitaj el la Sankta Libro de la islamanoj. 12,00 gld.

Elektitaj eldiroj de la Sankta Profeto Mohammad. El la angla trad. A.J. Middelkoop. 1991. 53p. 21cm. Dulingva: araba-E. Kolektitaj eldiroj de la sankta fondinto de Islamo, grupigitaj laŭ temoj. 5,40 gld.

Elektitaj partoj el la verkoj de la Promesita Mesio. Hazrat Mirza Ghulam Ahmad. El la angla trad. A.J. Middelkoop. 1991. 78p. 21cm. Dulingva: araba-E. Ĉerpoj el la ĉ. 80 libroj verkitaj de la Atendata kaj Promesita Mesio kaj Mahdi, la fondinto de Ahmadiyya-Islama Komunumo. 6,60 gld.

Mendeblaj ĉe la Libroservo de UEA. Triona rabato ekde 3 ekzempleroj.

Eldonis: Ahmadiyya-Islama Komunumo, Hago  
(Oostduinlaan 79, 2596 JJ Den Haag, Nederlando).




Tibor Sekelj

## Kumeŭaŭa

Ree haveblas ĉi tiu populara romaneto  
tradukita en dudekon da aliaj lingvoj!

Kumeŭaŭa, la filo de la ĝangalo, de T. Sekelj. Rotterdam: UEA, 1994  
(2-a eld.). 96p. 21cm. Riĉe ilustrita. 15,00 gld. Triona rabato ekde 3 ekz.



### La Jarlibro akompanos vin tra tuta jaro... donu taŭgan veston al ĝi!

UEA ofertas elegantan bonkvalitan platan kromkovrilon por via Jarlibro. Mendu ĝin kontraŭ 1,80 gld. (+ afranko kaj, ene de EU, imposto de 17,5%). Triona rabato ekde 3 ekz.

Modernaj ekipaĵoj pliefikigas la laboron de la Centra Oficejo.

## FONDAĴO OFICEJA ILARO

bonvenigas ankaŭ vian donacon. Koran antaŭdankon!


## Jen la plej

vaste legata junulara gazeto  
rekomendinda por komencantoj  
bela kaj moderna  
diversa kaj amuza  
interesa por ĉiuj

**KŬTAKTO** estas gazeto  
por ĉiu, kiu serĉas interesan  
legajon en Esperanto. Ĉiu  
numero havas ankaŭ tekstojn  
en tre facila lingvo, tiel ke  
**KŬTAKTO** estas aparte taŭga  
por komencantoj kaj por  
Esperanto-kursoj. Krome,  
konkurso atendas vin en  
ĉiu numero de la revuo!  
En 1995 **KŬTAKTO** aperos  
6-foje. Abonu rekte de UEA  
aŭ ĉe via kotizperanto.

### ABONTARIFO 1995

|           |              |          |              |             |              |
|-----------|--------------|----------|--------------|-------------|--------------|
| Aŭstralio | 30 dolaroj   | Francio  | 125 frankoj  | Nederlando  | 41 guldenoj  |
| Aŭstrio   | 245 ŝilingoj | Germanio | 37 markoj    | Norvegio    | 150 kronoj   |
| Belgio    | 765 frankoj  | Hispanio | 2100 pesetoj | Pollando    | 20 guldenoj  |
| Brazilo   | 20 guldenoj  | Israelo  | 32 guldenoj  | Portugallio | 2500 eskudoj |
| Britio    | 15 pundoj    | Italio   | 30000 liroj  | Svedio      | 170 kronoj   |
| Danio     | 150 kronoj   | Japanio  | 2880 enoj    | Svislando   | 31 frankoj   |
| Finnlando | 115 markoj   | Kanado   | 29 dolaroj   | Usono       | 22 dolaroj   |



**TEJO** lotumos valorajn premiojn  
inter ĉiuj abonantoj. Bonŝancon!

## Ĉapelilo 1.0

Komerce pretigita tekstoprilaborilo por Esperanto sur IBM-kongruaj komputiloj ekde Vindozo 3.0. Helpsistemo kaj manipulado pure en Esperanto. Ankaŭ por novuloj facilege majstrebla. Esperantaj kaj nacilingvaj signoj sur ekrano kaj printilo. Skaleblaj tiparoj por ĉiuj aplikoj. Ĉiuj necesaj funkcioj por alloge aranĝi vian tekston. Literumad-kontrolilo baze de redakteblaj vortaroj kun pli ol 120 000 vortoj. Disadresada funkcio. Importo kaj eksporto per diversaj formatoj por interŝanĝo. Grafikaĵoj integreblaj.

Enkonduka prezo nur 200 germ. markoj plus ekspedo. – Tuj mendu! Esperanto parolata!

Tel: +49-6081-66722, faksilo: +49-6081-3955, reto: 100103.24@compuserve.com  
Professional Consulting, s-ro PEJNO Simono, Am Füllgarten 4, D-61250 Usingen

Ame kaj klere  
verkita klasikajo:

## Vivo de Zamenhof

(1920)

de Edmond Privat

134 p. 18 cm.

Bind. 18,90 gld.

Triona rabato ekde tri ekz.